



HELPANTA TEMARO

por
lernigi
rapide

Esperanto



1934

L124

de Julio Mangada Rosenörn

V E R K A R O

Liverota de Hispana Esperanto Asocio (Apartado de Correos—Poŝta Kesto—1.089. Madrid), preskaŭ preskoste al la samideanaro:

AMELIA KAJ MARINA, de Julio Mangada Rosenörn, 22 $\frac{1}{2}$ × 16 cm., 116-paĝa en tre luksa papero, kun kelkaj bildoj, entenas 88 poemoj. Prezo: Por membroj de la Hispana Esper-Asocio, 2 pt. Por ceteraj hispanaj kaj hispan-amerikanaj samideanoj, 4 pt. Por ĉiuj ceteraj samideanoj, 3 sv. fr.

TERMINOLOGIO DE LA ARKITEKTURO, de Francisco Azorin, 20 × 14 cm., 210 paĝa en luksa papero kaj pli ol 2.000 bildoj ilustrantaj la terminaron. Prezo: 8 sv. fr.

MIA POEZIO (POEMARO), de Rafael de San Millán. 17 $\frac{1}{2}$ × 12 $\frac{1}{2}$ cm., 62 paĝa. Prezo: 0,60 el sv. fr.

LA KREITAJ PROFITOJ, komedio originale hispane verkita de Jacinto Benavente, tradukita de Vicente Inglada. 17 $\frac{1}{2}$ × 12 $\frac{1}{2}$ cm., 96 paĝa. Prezo: 0,75 sv. fr.

LA GENIA KAVALIRO DON KIĤOTO DE LA MANĈA (Rimarkoj pri la titolo de la verko, dediĉo, antaŭparolo, versaĵoj al la libro, k. c., kaj unua ĉapitro de la fama verko), de Cervantes, tradukita de Julio Mangada Rosenörn, 16 $\frac{1}{2}$ × 12 cm., 31 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,45 sv. fr.

AVILA, de Julio Mangada Rosenörn, historia-arta priskribo, biografioj de Sankta Tereso, la tutmondjama verkistino, kaj de Alonso de Madrigal nomata Oceano de la Sciencoj (komenco de la XV jarcento), k. c., kun 30 belaj bildoj, luksa papero, 16 $\frac{1}{2}$ × 12 cm., 62 paĝa. Prezo: 0,75 el sv. fr.

FERDINANDO VI KAJ FARINELLI, de Julio Mangada Rosenörn. Historia noveleto originale verkita proze kaj verse, 19 × 14 cm., 32 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,60 el sv. fr.

PRI HISPANUJO KAJ GIAJ POPOLKANTOJ. POPOLKANTARO DE MURCIA, de Julio Mangada Rosenörn, ilustrita eĉ kun multenombraj muzikaĵoj, 19 × 14 cm., 51 paĝa luksa papero. Prezo: 0,75 el sv. fr.

EL MODERNA HISPANA PARNASO, enhavanta poemojn tradukitajn de Julio Mangada Rosenörn, kun belegaj ilustraĵoj (20 bildoj), 19 × 14 cm., 32 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,75 el sv. fr.

DU JUNAJ FRAŬLINOJ KAJ KORNELIINO, du novelaj el

HELPANTA = TEMARO

— P O R —

LERNIGI RAPIDE ESPERANTON


— D E —

Julio Mangada Rosenörn

TRIA ELDONO (1914-1925-1934) ampleksigita de la aŭtoro per multenombraj spritaj rakontetoj kun karikaturaj bildoj, de plej bonaj hispanaj karikaturistoj, por grafika klarigo. La verko estas proprajo de la Hispana Esperanto Asocio, ĉar la aŭtoro cedis sindoneme al la Asocio ĉiajn siajn rajtojn, pro kio H. E. A. eldonis ĝin.

PREZO: 3 sv. fr. por ĉiuj landoj.

PRESEJO: CHULILLA KAJ ANGEL
TORRECILLA DEL LEAL, 17
M A D R I D



PRI ĈI TIU VERKO

Pri la dua eldono (1925) jen la recenzo aperinta en «Esperanto Praktiko» de februaro de 1927 (Berlín): «La libreto prezentas en 18 temoj (La Saluto. Korespondado. Marekskurso. La homa korpo. Nutraĵoj. Bestoj, k. t. p.) tre riĉenhavan bone elektitan provizon da vortoj kaj parolturnoj el la ĉiutaga vivo. La instruanto diru ĉiun frazon kaj transformu ĝin en respondotan de la lernanto demandon. La lernantoj laborintaj la tutan temaron—la por hejma laboro ja ne estos malgranda—kapablos flue paroli pri ĉiutagaj aferoj. Kvankam oni eble dezirus tiun aŭ tiun ideon alie esprimita, oni rajtas nomi la verketon bonstila. Dr. G.»

Estas espereble ke ĉi tiu nova eldono ankoraŭ meritu almenaŭ saman juĝon.

PRESERAROJ

Paĝo	Linio	Diras	Devas diri
3	antaŭlasta	laŭ vole	laŭvole.
6	13	determinata estas	determinata, estas.
8	14	ili ŝatos, ili	li ŝatos, li...
9	4	segusta	sengusta.
14	5	maldektra	maldekstra.
16	3	ŝulttron	ŝultron.
19	antaŭlasta	etis	estis.
21	1	maldekstran	dekstran.
39	12	akordojn	agordojn.
41	13	tia trapikas	tiu trapikas.
46	16	tutan alvenon	tujan alvenon.
51	13	kazerno	kazerno.
52	12	havenkajoj	havenkajoj.
58	9	ŝaŭmon vojon	ŝaŭman vojon.
59	12	ŝipojn	ŝipon.
64	15	maljunaj	maljunaj.
70	antaŭlasta	brom	krom.
71	13	anuaĵ	unuaj.
73	13	anguilo	angilo.

ANTAŬDIROJ

Rekta metodo, por paroladi Esperanton, per demandoj kaj respondoj, estas la sistemo, kiun mi utiligas, de antaŭ multaj jaroj, kaj kiu gvidis min por verki la «Helpanta Temaro por ĉiuj Landoj»; saman metodon mi sekvas por ĉi instruigilo aŭ paroligilo de nia lingvo, kun la tre grava helpo de karikaturnaj bildoj kaj spritaj priskriboj elĉerpitaj el gravaj ĵurnaloj de Madrido.

Kiel agos la kursgvidanto aŭ profesoro?

Ni concernu, por la klarigo, la unuan paragrafon priskribantan pri Arrúe:

Ie. La profesoro laŭte, klare kaj malrapide, en la komenco silabigante, legas la paragrafon, kaj konsilas atenton de la instruotoj, kaj ke ili mallaŭte prononcu ĉiun silabon, ĉiun vorton, k. t. p., laŭ eblo. Kiam li trovas sonon, kiu en la patra lingvo ne estas, li klarigas la sonon, li klare diras kiamaniere oni devas pretigi la buŝajn organojn, kiuj produktas la sonon; li devigas iun aŭ iujn lernantojn produkti la sonon, kaj li korektas, korektadas, por almenaŭ alproksimiĝi al la ĝusta elparolo, rekomendante fari ekzercojn por trafi la korektan prononcadon. Kiam la profesoro trovas literon, kies sono ne estas sama, kia estas en la nacia propra lingvo, li faros klarigojn necesajn.

Ile. La profesoro ekfaradas demandojn laŭ jena plano:

«Ĉu Arrúe estas unu el plej bonaj karikaturistoj de Hispanujo?» La demandata lernanto, gvidate de la lernolibro mem, se li ne povus konservi en la memoro la tutan frazon, legante, respondas: «Arrúe estas unu el plej bonaj karikaturistoj de Hispanujo.» Denove la profesoro demandas per iu ajn el la jenaj frazoj: «Ĉu vi scias la tradukon de la frazo?» «Ĉu vi konas la hispanan signifon de la frazo?» «Ĉu vi povas traduki hispane?» «Ĉu vi povas diri al ni la frazon en hispana lingvo?», kaj per kiu ajn alia simila demando. La lernanto devos respondi farante frazon saman, kia estas la demando, per frazo konstanta el samaj vortoj de la demando, antaŭdirante «jes» aŭ «ne», kaj anstataŭante la pronomon «vi» per «mi». Se la lernanto ne respondus okaze de nerememoro de la vortoj formantaj la demandon, la profesoro dirus: «Atentu, konservu en la memoro la parolojn! Mi denove faros la demandon», kaj la profesoro ĉi tiun farus; ankaŭ la profesoro povas sin turni al alia lernanto, dirante: «Sinjoro, ĉu vi povas helpi vian kamaradon?» Ĉiam nepre oni devas respondi per kompleta

frazo, kaj okaze de scio por la traduko, la lernanto ne tradukos, ĝis kiam la profesoro estu dirinta: «Traduku!», aŭ «Bonvolu traduki!», aŭ «Diru al ni la tradukon!». aŭ «Nu: havu la bonvolon diri la frazon en hispana lingvo!», aŭ dirinta alian similan ordonantan frazon.

La tradukonto devos nepre traduki vorton post vorto, sen iu ajn salto; se li ne scius tradukon de iu vorto, li diros ĝin esperante, kaj ĉiuj ceteraj lernantoj silentos; kaj multfoje la tradukanto trafas la rekonatan vorton konsekvence, por kompleti la penson esprimatan de la frazo; kaj se male, la profesoro diras: «Ni trovos la signifon per novaj frazoj», kaj la profesoro ekfaradas frazojn por trafi la signifon, ekfaradas helpante sin per mimiko, gesto, objektoj, desegnoj kvankam ne bone faritaj, ĉiel; kaj estas ĉi tiuj momentoj de la klarigado, kiam atento ĉies estas plej streĉata kaj plej bona frukto rezultas. Anekdotoj, proverboj, spritaĵoj, ŝercoj, k. t. p., estas bonegaj helpiloj, kun la antaŭe aluditaj (mimiko, gesto...). Same la profesoro daŭrigos: «Ĉu Arrúe estas bonega desegnisto?» «Ĉu li genie kaj tre sprite vidigas tipajn scenojn?» «Ĉu li vidigas tipajn scenojn kun klarigoj en hispana lingvo?» «Ĉu la klarigoj estas laŭ speciala parolturno uzata de la vaskoj?» «Ĉu la parolturno uzata de la vaskoj estas tre sprita?», k. c.

Gramatikajn regulojn, prefiksojn kaj sufiksojn, k. c., oni klarigos dum la praktikaj lecionoj de tempo al tempo, per sama metodo, ekzemple: «Rimarku, ĉiuj nomoj finiĝas per o», «Ĉu ĉiuj nomoj aŭ substantivoj finiĝas per o?»; «Nu; la vokalo o estas ĝenerala karakterizo de la nomo», «Kio estas la vokalo o?» «La pluralo finiĝas per la konsonanto j», «Per kiu konsonanto finiĝas la pluralo?»


Tiel oni kutimigas tuj, rapide, la aŭdan organon al esperantaj sonoj; tiel oni havigas rapide, agrable, vortojn al la memoro; tiel oni devigas de la unua momento la lernanton paroli la lingvon; tiel oni instruas senpeze la gramatikajn regulojn.

KIU ESTAS ARRUE?

Arrúe estas unu el plej bonaj karikaturistoj de Hispanujo, bonega desegnisto; genie kaj tre sprite vidigas la tipajn scenojn, kun klarigoj en la hispana lingvo, sed laŭ speciala parolturno uzata de la vaskoj, kiu estas tre sprita.

HOMO SINGARDEMA (el la nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRISKRIBO PRI LA BILDO.—Saturio, vasko, sidas sur ŝtona benko, kiu estas apud la pordo de lia domo, maldekstre de li. Li legas atente ĵurnalon. Antaŭ la pordo kuŝas granda fidela hundo, kiu gardas la domon; forta koliero el ledo kun akraj ŝtalaj



pikiloj ŝirmas la kolon de la trankvile kuŝanta hundo, kontraŭ la mordoj de lupoj kaj aliaj hundoj. La vasko estas alta kaj malgrasa, maljuna, kun akrepinta nazo. La vestaro estas tipa, kaj konsistas el vaska ĉapeto lana, ĉemizo, longa pantalono, pantofloj el kanabo; sufiĉe larĝa kaj longa lana zono ĉirkaŭas diversfoje lian talion sur la pantalono.

I.—Saturio legas kaj ekkrias: —Legante ĉi tiun teruraĵon, miaj ĥeroj hirtigas tiel, ke ili traborcis la ĉapeton!

La profesoro, uzante la planitan metodon, klarigas laŭvole esperante sonojn de la j, k, c, ĉ, z, g, ŝ, ĵ, ŭ kaj ĝ, kaj sufiksojn ist, ig kaj ar, dirante ekzemplojn el ĉi lastaj. Li mem povas traduki fojojn.

La profesoro klarigas laŭvole sonojn, prefiksojn, sufiksojn, akuzativon, kunmetitan vorton, k. t. p.

PRI LA BILDO.—Amiko de Saturio, alia vasko, alvenas, kaj Saturio stariĝas por saluti la amikon kaj rakonti al li la teruran novaĵon. La fidela hundo, kiel bone edukita estulo, ankaŭ stariĝas je la alveno de la amiko por montri al ĉi tiu sian amon. La ĵus alveninto estas vestata same kiel Saturio, sed sur la ĉemizo li portas



veŝton; li estas grasa kaj forta, kaj tiel alta kiel Saturio; li verŝajne estas bonkora, ĉar lia sintenado, kun la manoj en la poŝoj de la pantalono, vidigas lin naŭva vilaĝano. La grasa vasko diras al Saturio: —Bonan matenon Saturio, kiel vi fartas?, kaj Saturio diras: —Bone. Ĉu via familio ankaŭ bonfartas?


—Jes ankaŭ ĉiuj miaj familianoj bonfartas—, respondas la amiko, aldonante: —Kion vi legas?

Saturio, tenante la ĵurnalon en la maldekstra mano, rakontas al la amiko la teruraĵon, la krimon, kiu impresas kaj maltrankviligas la naŭvan grasulon, dirante: —Edzo kaj edzino, la du mortigitaj... La banditoj ilin prenis ĉe la kolo; premis, premegis... kaj la geedzoj... senvivaj...

La amiko tre impresite demandas: —Ĉu ĉe la kolo?

Ekzemple.—Mal estas prefikso, kiu donas kontraŭan signifon al tiu de la radiko kun kiu kuniĝas.—Kian ideon donas la prefikso mal? Kiam la demandito estu respondinta per la unua frazo, la profesoro

PRI LA BILDO.—Saturio tenas la ĵurnalon en la dekstra mano kaj per la maldekstra, kun gestoj kvazaŭ premante sian gorĝon, kaj eligante sian langon, klarigas la faron de la rabistoj, parolas : —Jes, do, ĉe la kolo... Kiel mortpendigi... La geedzoj estis dormantaj, kaj la friponoj, por ke la atencatoj ne krii, premis iliajn gorĝojn...



La amiko ekteruriĝas, eltirante la manojn el la pantalonpoŝoj, duonlevante la brakojn, kaj li deiras aŭ ekmarŝas forte impresite dum li samtempe turnas la rigardon en la kolon de la hundo ekpaŝanta, kies koliero vekis en lin iniciativon.

diros al la demandito mem aŭ al alia lernanto : —Sinjoro (aŭ fraŭlino) faru la kontraŭajn ideojn de alta, granda, larĝa, longa, bona, rapida.

—Sinjoroj (aŭ gesinjoroj) atentu klarigojn jenajn—kaj sin turnante al ĉiu ajn la profesoro demandas : —Kion atentu vi, sinjoroj (aŭ gesinjoroj)—, kaj post la respondo la profesoro aldonas la jenon aŭ similaĵon, dividante ĝin laŭ frazoj por fari pliajn demandojn : —La prepozicio el estas uzata kiel prefikso,—ĝi donas ideon pri movo,— pri movo de interna parto al ekstera (montru koncizajn ekzemplojn).— La kontraŭan ideon, la ideon pri movo de la ekstera parto al interna, donas la prepozicio en, uzata ankaŭ kiel prefikso (donu koncizajn ekzemplojn).

PRI LA BILDO.—La amiko de Saturio, rigardinte la kolon de la hundo, impresite de la krimo, ekfaris la planon elpensitan. Jen li en ĉi bildo, vestate de jako ĉar la vetero fariĝis malvarmeta kaj densaj nuboj grizaj minacas pluve, aŭguras pluvon, pro kio li tenas



pluvevitilon aŭ pluvombrelon; li portas ĉe sub la dekstra brako pakaje-ton, kiu enhavas la kolieron de la hundo. Kontente li iras tra la strato al sia hejmo je la nokto, parolante al si mem: —Ho, ve! Kia terur-aĵo!... Eĉ ĉe la lito en la propra domo oni ne povas dormi trankvile! Sed mi estas singardema; mi fiaskigos atencantojn!...

—Aŭskultu, aŭdu bone kaj atentu, por konservi en la memoro la ideojn, la pensojn, la juĝojn: —Kunmetita vorto konsistas el du radiĝoj, unu, kiu estas en la fino, estas determinata; la alia, kiu iras antaŭ la determinata estas determinanta, ĉar ĉi tiu donas ian specialecon al la alia. En pantalonpoŝoj, poŝoj estas la radiĝo determinata, kaj pantalon' estas la determinanta. Oni povas diskunmeti la vorton laŭ jena formo poŝoj de pantalono. Same oni povas disigi aŭ diskunigi kunmetitajn vortojn, kaj male.

—Karaj lernantinoj kaj lernantoj, ni studu la manieron analizi la vortojn por plej bone trafi la signifon. Ni analizu la vorton pluvevi tilon: ĉi vorton vi ne trovos en vortaro, sed facile vi trovos la signifon

PRI LA BILDO.—Jam alvenis la horo por enlitiĝi. La amiko de Saturio sin preparas por enlitiĝi kaj dormi trankvile. Jen la alkobo: lito, kun molaj matracoj kaj kapkuseno; kun puraj litotukoj el lino kaj lano. Apud la lito, staras noktotablo, sur kiu kuŝas kan-



delingo kun brulanta kandelo lumiganta la ĉambron; super la noktotablon, de sur la muro, pendas kadro. Singardeme li metis ĉaspafilon inter la lito kaj la noktotablo. Li staras en la centro de la alkobo, kun la piedoj nudaj, en ĉemizo, kun la ekstretoj de la kalzono maligitaj, sen ĉapeto, sin surmetante la kolieron de la hundo kaj sin dirante: —Rabistoj jam povas veni por preni min ĉe la kolo!... Kian grandan fiaskon ili havos, dank' al la hundo de Saturio!...

analizante ĝin de la fino en la komencon por koni ĝiajn elementojn, kaj per kono de la elementoj, trafi, atingi, la signifon: jen, do, la procedo: lasta elemento estas la konsonanto n, kiu estas ĝenerala karakterizo de la akuzativo; la antaŭa elemento estas la sufikso il, kiu donas ideon pri instrumento aŭ aparato por la signifo de la radikoj antaŭa; ĉi tiu estas evit', radikoj de la verbo eviti; la antaŭe restanta elemento estas la radikoj pluv de la vorto pluvo. La analizo rezultigas, ke la vorton ni povas esprimi laŭ jene: ilon por eviti la pluvon, kaj tute facile ni konos ĝian signifon. Ĉiam oni devas procedi laŭ tiu ĉi analizo; ne miru, ne surpriziĝu antaŭ tiaj vortoj, trankvile rigardu ilin,

ĈĈ LA PLEJ LERTA ESTAS TROMPATA PRI LA BILDO.

—Jen vinvendejo. Jus eniris en ĝin drinkemulo, kiu staras apud la vendejtablo. Li ŝirmas sian kapon per la tipe vaska ĉapeto; la unua butono de lia veŝto estas butonunita sole, ĉar lia ventro estas tre volumena; li havas lipharon, kaj li uzas nigrajn botojn por kovri siajn piedojn. Li estas kvazaŭ eleganta, ĉar li uzas kravaton.

En la vendejtablo oni rimarkas dekstren, lasten, starantan metalan ŝprucigilon kun krano, por elfluigi la vinon per turniĝo de ĝia turnebla fermilo (fojojn la ŝprucigilo elfluigas la vinon per aŭtomata klapo).



Apude, maldekstren de la ŝprucigilo, estas akvujeto por lavi kaj purigi la glasojn kaj pokalojn.

Post la vendejtablo ridetas blonda grasa vinvendisto preta komplezi la klienton, servante al li tion, kion ili ŝatos, kion ili preferos trinki. La vinvendisto havas la manikojn de la ĉemizo refalditajn supren de la kubutoj; sin ŝirmas per antaŭtuko verda-blanka laŭ delikataj strioj, aŭ tre mallarĝaj franĝoj, kontraŭ makuloj de la vendotaj alkoholaĵoj. Li tenas en la dekstra mano glason de vino; kaj lia maldekstra mano estas preta malfermi la ŝprucigilon. Dorsen de la vinvendisto estas breto kun boteloj da brando, da rumo, da konjako, da diversaj likvoroj, da biero; flanken de la breto kuŝas bareloj da alkoholaĵoj.

La kliento diras: —Atentu! Servu al mi glaseton da vino, la unuan; sed vi, lavinte la glason, ŝekigu ĝin bone, ĉar mi ne volas, ke, tra mia gorgo, pasu, fluu, glitu, eĉ guto sola el tiu senkolora, senodora kaj segusta likvaĵo, kiun oni nomas akvo...

PRI LA BILDO.—La vinvendisto ne nur servis la unuan glason da vino, sed duan, trian kaj kvaran; kaj li foriris momenton. Sur la vendejtablo oni rimarkas la tri unuajn glasojn de vino, la tri



elĉerpitajn glasojn. La kliento ne trinkis, sed drinkis. Iom ebria, tenante la kvaran glason da vino kaj kantante kiel aktoro, aperas la malamiko de la akvo, fariĝante la plej entuziasma el ĉiuj ŝatantaj la operon «Marina». Li kantas:

—«El ĉi suko tre bongusta
mia gorg' estas kanal'...
Trinku mi, trinku mi jam sen halt'
pokalojn da likvor',
ĉar forgesigos vin'
ĉagrenojn de la kor'.»

.....
.....

PRI LA BILDO.—La drinkemulo kuŝas ĉe la lito. La mal-feliĉa edzino vokis la kuraciston, kiu estas maljuna kaj staras iom kurbigite, montrante la ŝvelintan ventron de la malsanulo, diagnozante la malsanon, post demandoj al la geedzoj kaj inspektado al la malsanulo, kiu tagon sin vidis senpova por ellitigi kaj sian ventron kvazaŭ plenplenan ledvinujon.

La grandan emon de la malsanulo al drinkado elpruvas la led-



vinujo, kiu pendas de sur la muro, maldekstren de la lito, kiu aperas plenplena je vino; kaj ankaŭ elpruvas la pentraĵo ankaŭ pendanta de sur la muro, super la liton, en kiu aperas botelo da vino, vinberaroj, k. c.

La doktoro sin ŝirmas kontraŭ la kruda malvarma vetero per surtuto, de kies dekstra poŝo pendas pinto de la naztuko.

La kuracisto diras: —Estas necese pinĉi la ventron por elĉerpi tutan akvon...

dispecigu ilin laŭ elementoj, de la fino en la komencon, kaj certe oni sukcesos traduki ĝin.

La profesoro klarigos ĝustokaze kazojn de la deklinacio, la kon-

PRI LA BILDO.—Antaŭ la lito staras la doktoro kaj la edzino de la malsanulo, kiu jam sidas sur la lito, apogante la dorson sur la kapkuseno kaj montrante grandan miron. Ne malpli grandan miron oni rimarkas en la mienon de la edzino kaj en ŝian sintenadon, kun la manoj krucumitaj kontraŭ la brusto. La doktoro montras al ili vitran poton, kiu entenas la akvon elĉerpitan el la ventro de la mal-



sanulo; kaj la geedzoj miras ĉar ili ne konscias, ili ne povas kompreni, ke la likvaĵo estas akvo. Sur benko apud la lito kuŝas la kuracilaro.

La vestaro aŭ kostumo de la virino konsistas el jako, jupo kaj pantofloj sur ŝtrumpoj el kotonoj kaj lano.

La malsanulo kun granda surprizo demandas al la doktoro: —Ĉu akvon vi elĉerpis?

La kuracisto respondas: —Jes, akvon. Jen pli ol ses litrojn da akvo..., kaj mi opinias, ke ankoraŭ restas...

La paciento redemandas: —Ĉu vi ne eraris? La likvaĵo devas esti blanka vino, ĉar...

—Ne, ne; akvo ĝi estas...

PRI LA BILDO.—La kuracisto, emetinte sian kuracilaron en la manvalizeton, surmetinte sian altan ĉapelon, butonuminte sian surtuton, remetinte bone sur sian nazon siajn okulvitrojn, prenis sian bastonon kaj la valizeton kaj adiaŭas la malsanulon, kiam ĉi tiu furioze, kolere, kaŭze de la certigo de la doktoro esti akvo la elĉerpita likvaĵo, sin decidis salti de la lito, minacante per la pugno, blasfemante,



insultante, dum la edzino restigas lin en la lito, prenante lin ĉe la brako. Oni vidas la nudan kruron de la malsanulo kun hirta vilaro. La kolera paciento diras minace :

—Nun mem mi ellitiĝas, mi min vestos, mi prenos bastonon kaj iros en la vinvendejojn por terure bastonfrapi la senkonsciencajn vinvendistojn. Eĉ ĉion mi dispecigos ĉe ili..., ĉar perfide ili englutigis akvon al mi !

jugacion, k. t. p. Ekzemple : En esperanto estas unu sola konjugacio ; ĝi estas absolute regula eĉ ĉe la tempoj por ĉiuj personoj de la singularo kaj de la pluralo : as estas la ĝenerala karakterizo de la estanta

MIGRINTOJ AL AMERIKO REVENAS... de Arrúe (el la nokta ĵurnalo de Madrido «Luz»).

PRI LA BILDO.—Ĉe la pordo de preĝejo staras unu apud alia maljunulo kaj maljunulino. Ambaŭ gemaljunuloj sin apogas sur pluvevitilojn, kaj ili parolas unu la alian. La maljunulo uzas kitelon



sur la ĉemizo; la maljunulino kovras sian grizan hararon per kufo, sur kiun ŝi metis nigran vualon.

La maljunulino, sin turnante al la maljunulo, diras: —Ĉu vi konvinkiĝis pri tio, kio estas la ĉielo? Tre klare klarigis tion la pastro...

—Jes, tre klare—diras la maljunulo—; sed tial ke mi vidis ne-nion, mi ne konvinkiĝis...

tempo, *k*iu esprimas la signifon de la verbo en la momento mem, *k*iam oni parolas; *i*s, tiu de la pasinta tempo, *k*iu esprimas la signifon de la verbo je tempo antaŭa de tiu en *k*iu oni parolas; *o*s, tiu de la venonta tempo, *k*iu esprimas la signifon de la verbo je tempo posta de tiu en *k*iu oni parolas; *u*s, tiu de la kondiĉa modo, en *k*iu la signifo de la verbo, por efektiviĝi, postulas plenumiĝon de antaŭa kondiĉo, *ĉi* modo havas la tri tempojn; *u*, tiu de la imperativo, *k*iu ordonas aŭ petas. Ant, int, ont, estas karakterizoj de la aktivaj parti-

PRI LA BILDO.—La maljunulino, ĉagrenate de la respondo de la maljunulo, koleras, fermas la manon kaj, levante la brakon, minacas la maljunulon per la pugno. Tial la maljunulo, timigite,



miras dum li per sia maldektra mano prenas kaj premas la randon de sia kitelo.

La maljunulino ekkrias: —Herezulo, eĉ pli ol herezulo!... Ankaŭ vi ne vidis Kubon, kaj tamen vi ne diros ke ne estas vera tio, kion diras pri Kubo la instruisto en la lernejo...

cipoj, kies tradukoj hispanaj estas ando, endo, ante, ente; at, it, ot, estas karakterizoj de la pasivaj participoj, kies tradukoj hispanaj, ne atentante la malregulaĵojn de la verboj, estas ado, ada, ido, ida. La malsimplaj tempoj estas formataj de la verbo esti, kiu estas la sola helpanta verbo, kun la participoj de la verbo konjugaciata.

La ĝenerala karakterizo de multaj adverboj, la vokalo e, estas ekvivalenta de la hispana finaĵo -mente. La profesoro atentos, ke ĉi tiuj aldonoj ne estas por montri ordigitan planon sekvoatan, estas nur kvazaŭ sugestioj, ĉar iniciativo de profesoro regas ĉiam.

Tre konvene estas starigi racian metodon aŭ sistemon por ke la lernantoj facile lernu la vortojn kiuj aperas en la genia tabelo, kiun la Majstro elpensis mirinde, kaj la logika kaj racia maniero estas la jena: ĉar ĉiuj havas komunan parton kiu estas i, ĉi tiun komunan parton

PRI LA BILDO.—Bonŝance por la maljunulo, kiam la vilaĝanino estis preta pugnobati lin, alvenis kvazaŭ elegantulo, kiun la vilaĝano prezentas al la vilaĝanino, dum li ameme metas sian dekstran brakon sur la ŝultrojn de la elegantulo.



La vilaĝanino, ankoraŭ iom kolera ĉifas sian vualon, dum la vilaĝano diras al ŝi: —Ĉu vi ne konas lin? Li estas Bernardo, la knabeto de nia najbaro Jozefo... Li veturis, kiel vi scias al Kubo antaŭ multaj jaroj... Li revenis el Kubo per vaporŝipo... Li vivadis en Kubo dum dekkvar jaroj...

konsideri radiko kun nedifinita signifo, kun nedeterminita signifo, kiun determinas aŭ difinas o - a - u - e - al - el - am - om - es, konsiderataj kiel sufiksoj, kun la respektivaj signifo, kiujn ili esprimas: ĉar al la vortoj formataj de la komuna radiko i kun la naŭ finaĵoj antaŭaj kvazaŭ sufiksoj oni antaŭmetas nen - ĉ - t - k respektive, oni povas konsideri ĉi tiujn elementojn prefiksoj kun la respektivaj signifo, kaj starigi la jenan skemon

nen - ĉ - t - k

i

o - a - u - e - al - el - am - om - es

PRI LA BILDO.—La vilaĝano kaj la ĵus alveninto de Kubo ŝanĝis siajn lokojn, kaj estas nun la alveninto, kiu ameme apogas sian dekstran manon sur la ŝulttron de la vilaĝano. La vilaĝano furioze pagis la pluvevitilon de la maldekstra mano al la dekstra,



kaj ŝia sintenado montras ŝin, vidigas ŝin preta frapi, ataki la vilaĝanon. Ĉi tiu trankvile alparolas al ŝi: —Jen li, reveninta de Kubo; kiam vi montros al mi iun reveninta de la ĉielo ĉu vaporsipe, ĉu aeroplano, tiam mi konvinkiĝos absolute pri la ĉielo...

Unue iras de i al respektivaj naŭ kvazaŭ sufixoj; poste, de nen al i kaj sinsekvaj naŭ finaĵoj; sekve, de ĉ al i kaj ceteraj naŭ finaĵoj, k. c. Oni devas, kompreneble, klarigi unue kian signifon havas la elementoj de la skemo en la patra lingvo.

La antaŭaj sugestoj estas sufiĉaj por ke kurgoidanto disvolu perfekte la instrumentodon.

Vere ĉi **LIBRO** estas la III^a eldono de mia «Praktika Esperanta Lernolibro por Ĉiuj Landoj», kiun mi eldonis je 1914, kiun mi plibonigis kaj ampleksigis por la II^a eldono aperinta en 1925, kun la titolo «Helpanta Temaro por Lernigi Rapide Esperanton», tial ĉi libro enhavas ankaŭ la tekston de la antaŭaj eldonoj.

LA SALUTO

Profesoro diras :

Mi iras tra la strato Sagasta.
Sur ĝia dekstra trotuaro.
Baldaŭ mi renkontas amikon.
Li marŝas sur la centra perono.
Sur la centra perono de la bulvardo.

Ni vidas nin reciproke.
Tial ni iras al renkontiĝo.
Ni alvenas unu al la alia kaj ni haltas.

Mi haltas kaj li ankaŭ.
Mi prenas kaj premas lian dekstran manon.

Mi diras : «Kiel vi fartas?»
Li respondas : «Bone, kaj vi?»
Mi respondas : «Mi ankaŭ fartas bone.»

Ni konversacias dum kelke da tempo.

Ni interparolas iom da tempo.

2 Fine, ni adiaŭas nin reciproke.
Mi diras : «fartu bone, ĝis revido.»

Profesoro demandas :

Tra kiu strato mi iras?
Sur kiu trotuaro?
Kiun mi renkontas baldaŭ?
Ĉu li marŝas sur la centra perono?
Ĉu sur la centra perono de la bulvardo?

Ĉu ni vidas nin reciproke?
Kial ni iras al renkontiĝo?
Kion ni faras, kiam ni alvenas unu al la alia?

Ĉu mi kaj li haltas?
Kion mi prenas kaj premas al li?

Kion mi diras?
Kiel li respondas?
Kiel mi respondas?

Dum kiom da tempo ni konversacias?

Kiom da tempo ni interparolas?

Ĉu fine ni adiaŭas nin reciproke?
Kion mi diras?

Lernanto respondas :

Vi iras tra la strato Sagasta.
Sur ĝia dekstra trotuaro.
Baldaŭ vi renkontas amikon.
Jes, li marŝas sur la centra perono.
Jes, sur la centra perono de la bulvardo.

Jes, vi vidas vin reciproke.
Tial vi iras al renkontiĝo.
Vi alvenas unu al la alia kaj vi haltas.

Jes, vi haltas, kaj li ankaŭ.
Vi prenas kaj premas lian dekstran manon.

Vi diras : «Kiel vi fartas?»
Li respondas : «Bone, kaj vi?»
Vi respondas : «Mi ankaŭ fartas bone.»

Vi konversacias dum kelke da tempo.

Vi interparolas iom da tempo.

Jes, vi adiaŭas vin reciproke.
Vi diras : «fartu bone, ĝis revido.»

Profesoro diras :

Li diras same al mi.
Ni supozu, ke la amiko estas malsana, ke li malbonfartas.
La amiko fartas malbone.
Li respondas al mia demando : «Mi fartas nun malbone.»
Li suferas pro gripa kataro.
Mi rekomendas al li atenti la malsanon, zorgi la resaniĝon kaj sin flegi.
Fine venas la reciproka adiaŭo.
Mi, dirante : «Resaniĝu baldaŭ, rapide.»
Li, dirante al mi : «Mi dankas vin. Salutu vian familion.»
Poste, ni ambaŭ, la du, daŭrigas niajn irojn.
Mi min direktas supren.
Li iras kontraŭan direkton.
Li piediras kontraŭen, malsupren.
Ĉiu el ni alkuras al niaj respektivaj okupoj.

Profesoro demandas :

Ĉu li diras same al mi?
Kion ni supozu?
Ĉu la amiko fartas malbone?
Kion li respondas al mia demando?
Pro kio li suferas?
Kion mi rekomendas al li?
Kion fine venas?
Kion dirante mi?
Kion dirante li al mi?
Kion poste ni ambaŭ, la du, daŭrigas?
Kien mi min direktas?
Kien li iras?
Kien li piediras?
Al kio alkuras ĉiu el ni?

Lernanto respondas :

Jes, li diras same al vi.
Ni supozu, ke la amiko estas malsana, ke li malbonfartas.
Jes, la amiko fartas malbone.
Li respondas al via demando : «Mi fartas nun malbone.»
Li suferas pro gripa kataro.
Vi rekomendas al li atenti la malsanon, zorgi la resaniĝon kaj sin flegi.
Fine venas la reciproka adiaŭo.
Dirante vi : «Resaniĝu baldaŭ rapide.»
Li, dirante al mi : «Mi dankas vin. Salutu vian familion.»
Poste, vi ambaŭ, la du, daŭrigas viajn irojn.
Vi direktas vin supren.
Li iras kontraŭan direkton.
Li piediras kontraŭen, malsupren.
Ĉiu el vi alkuras al viaj respektivaj okupoj.

En la sekvantaj temoj manĝas la respondoj, ĉar ĉi tiu temo montras la manieron, kiel oni devas praktiki ĉiam.

PRI LA TEMPO

Profesoro diras :

Nia planedo ĉirkaŭiras ĉirkaŭ la suno, aŭ rondiras la reĝan astron.

Oni nomas jaro la tempon de la ĉirkaŭiro aŭ de la rondiro.

Jaro konsistas el dekdu monatoj.

Ankaŭ el tricent sesdek kvin tagoj.

La nomoj de la monatoj estas : januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro kaj decembro.

Estas jaroj kiuj konsistas el tricent sesdek ses tagoj.

Tri monatoj estas kvaronjaro.

Ses monatoj estas duonjaro.

Jaro havas kvar sezonojn.

La du unuaj estas printempo kaj somero.

La ceteraj estas aŭtuno kaj vintro.

La tero turniĝas sur sia akso.

Ĝi turniĝas dum unu tago.

Dum dudekkvar horoj.

Sep tagoj estas unu semajno.

Ĝi estas parto de la monato.

Oni nomas lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo, la tagojn de la semajno.

Mi scias, kio estas tago.

La tago havas dudekkvar horojn.

La horo havas sesdek minutojn.

La minuto havas sesdek sekundojn.

Hodiaŭ estas ĵaŭdo.

Morgaŭ estos vendredo.

Hieraŭ etis merkredo.

Postmorgaŭ estos sabato.

Profesoro demandas :

Ĉirkaŭ kio ĉirkaŭiras aŭ rondiras nia planedo?

Kiel oni nomas la tempon de la ĉirkaŭiro aŭ de la rondiro?

El kio konsistas jaro?

El kio ĝi konsistas ankaŭ?

Kiuj estas la nomoj de la monatoj?

Ĉu estas jaroj kiuj konsistas el tricent sesdek ses tagoj?

Kio estas kvaronjaro?

Kio estas duonjaro?

Kiom da sezonoj havas jaro?

Kiuj estas la du unuaj?

Kiuj estas la ceteraj?

Sur kio turniĝas la tero?

Dum kiom da tempo ĝi turniĝas?

Dum kiom da horoj?

Kio estas semajno?

Ĉu ĝi estas parto de la monato?

Kiel oni nomas la tagojn de la semajno?

Ĉu vi scias, kio estas tago?

Kiom da horoj havas la tago?

Kiom da minutoj havas la horo?

Kiom da sekundoj havas minuto?

Kiu tago estas hodiaŭ?

Kiu tago estos morgaŭ?

Kiu tago estis hieraŭ?

Kiu tago estos postmorgaŭ?

«ĈU NE ESTU ALKOHOLEMA?» (el nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Vidu forĝejon, en kiu staras antaŭ granda amboso forĝisto sufiĉe maljuna sed tre forta kaj plena je vivo, kontraŭ li ankaŭ staras la nova kuracisto de la vilaĝo, kiu sin sentas altirata de la tre simpatia, laborema kaj atleta forĝisto, pro kio ofte li vizitas la forĝejon por pasigi tempon agrable dialogante kun la bonhumora laboristo. La forĝisto, kun la manikoj de la ĉemizo refalditaj super la kubutojn faras cigaredon, kiun donacis al li la kuracisto, dum la kuracisto parolas kaj jam tenas sian cigaredon. Oni rimarkas la fortan kolon kaj ampleksan bruston de la forĝisto ĉar la kolumo de la ĉemizo estas malbutonumita. La vizaĝo de la forĝisto estas nobla kaj tute razita. Lia vestaro estas simpla, pantalono, ŝtrumpetoj kaŝitaj de la ekstreĵoj de la pantalono kaj de la kanabaj pantofloj.



La kuracisto sin vestas per sporta kostumo el ĉapeto lana kun viziero, jako, rajdpantalono, ledaj gamaŝoj avelkoloraj kiel la botoj, kaj sur ĉi tiuj la spronoj. Liaj brakoj estas fleksataj, kaj sub la


maldekstran li havas vipilon. Ĉar li estas miopa, li uzas okulvitrojn, ankaŭ li havas lipharon.

Dekstren de la forĝisto kaj malantaŭen de li, estas knabo, forĝlernanto, kiu emas la metion, subtenante feran akson metitan parte en la fajron de la kameno. Liaj pantalonoj estas didversloke flikitaj kaj iom mallongaj permesante vidi liajn ŝtrumpetojn kun blankaj kaj nigraj strioj. Li uzas, kiel la mastro, kanabaj pantofloj.

Tagon, la kuracisto demandis la forĝiston: —Bonvolu diri, amiko, ĉu vi estas ema je la trinkado el vino?

—Ĉu mi? Eĉ nek... ĝin flari...!—respondis la forĝisto.

PRI LA BILDO.—Jen ja la ruĝigita akso sur la amboso, subtenita de la senhara forĝisto per fera premilo, de lia maldekstra mano, kaj ankaŭ de la knabo kun tro flikita pantalono, de liaj manoj



ŝirmataj de malseka ledaĵo kontraŭ la varmo de la akso, kies ankoraŭ ruĝigantan parton la senhara laboristo batadas aŭ marteladas tre energie malgraŭ sia granda aĝo per granda martelo. Dume, la kuracisto, atentante la laborkapablon de la maljuna kaj simpatia forĝisto, diras:

—Tial vi estas tiel forta...

—Mi ne scias, do. Mia patro devigis min malsati la vinon...
Ĉiutage li revenis ĉe ni tute ebria; kaj li bastonfrapadis mian patrinon
kaj ankaŭ...!

—Kaj kompreneble, via patro mortis juna, ĉu ne?...

PRI LA BILDO.—La kuracisto kun la forĝisto staras apud angulo de la domo, inter muro ĝia kaj bordo de rivereto. La maljunulo montras per sia maldekstra brako etendita ion; la kuracisto montras sintenadon pro miro vidante tion, kion la forĝisto montras kaj aŭdante la dirojn. En la pejzaĝo aperas montetoj en la fono, de kie elfluas rivereto kun icmete tranĉitaj bordoj; por paŝi de unu en alian bordon, oni vidas surirejon el tri grandaj ŝtonoj metitaj laŭ larĝe la fluejo. Ĉe la maldekstra bordo, oni vidas malfeliĉan virinon, kiu celas forkuri kaj sin liberigi el viro ŝin prenanta ĉe la dekstra brako;



la virino estas terure bastonfrapata de la viro kaj ŝi ŝirmas sian kapon per sia maldekstra mano kontraŭ la frapoj de la bastono, malantaŭen kaj iom maldekstren de ili, terunigite kaj plorante, infano vidas la scenon. Post la infano staras alia domo, kies pordon kaj balkonon

oni vidas en la ĉefa fasado; kaj de sur la tegmento kaj flanko de la domo, elvidiĝas folioplena granda arbo.

—Ĉu morti juna?... Jen li, ankoraŭ, forigante la polvon per bastono al sia kvara ĉedzino, antaŭ mia frato plej malgranda, plej fruaĝa!...

—diras la forĝisto, kaŭzante la miron de la juna kaj nova kuracisto de la vilaĝo.

«**LA REKTA LINIO**» (el la matena ĵurnalo «El Sol», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Jen pejzaĝo, en kiu oni vidas kamparon kun longigitaj altanetoj en la fono, trunkon de arbo duavice, kaj unuavice du knabojn irantajn sur vojo; sendube la du knaboj estas kunlernantoj, kamaradoj de la sama lernejo loĝantaj en la kamparo, en izolaj domoj, kaj irantaj al la lernejo. Dum la marŝado ili kon-



versacias laŭ vidigas la sintenado de ambaŭ kaj verŝajne je la momento, kiun prezentas al ni la bildo, laŭ la gesto de la knabo iranta maldekstre, li sin turnas, li alparolas al la alia. La vestaro ilia estas sama: la tipe vaska ĉapeto ŝirmanta iliajn kapojn, kiteloj sur la ĉemizo,

mallongaj pantalonoj kiuj lasas libere la nudajn tibikarnojn, pantofloj eĉ kanabo. Leda librujo pendas en ambaŭ de iliaj maldekstraj ŝultroj per rimeno sur la dekstrajn koksojn, en kiu ili portas siajn librojn, paperojn kaj skribilojn (kraĵonojn, plumojn). Ambaŭ knaboj elmontras per siaj vizaĝoj kaj larĝaj fruntoj esti inteligentaj, sed la vizaĝo kaj la rigardo de la maldekstra knabo estas pli agrabla, pli simpatia, tre afabla, elmontras grandan sincerecon kaj bonecon; bedaŭrinde ĉi tiu alloganta knabo, pli bela ol la alia kuniranto, estas lama, li estas kriplulo, ĉar lia maldekstra kruro estas rigide fleksita, pro kio li devas sin apogi per bastono tenata kaj uzata de sia maldekstra mano; li penegas piediras balanciĝante kaŭze de sia lameco, kiun li elportas rezignacie kaj grandanime. Ambaŭ knaboj aperas kun la dekstraj brakoj fleksitaj duone, kaj la kamarado de la aminda lamulo ŝirmas sian maldekstran manon ĉe la poŝo de la pantalono.

Hermenefildo, la lamulo, estas tre serioza kaj studema, kaj spite de sia granda lameco, kaj malgraŭ la distanco de sia kampodomo al la vilaĝa lernejo, ĉiutage ĉeestas la lecionojn de la instruisto.

LA HORLOGO


Profesoro diras:

Horloĝo estas maŝino.
Per ĝi oni mezuras la tempon.
Estas diversaj specoj.
Horloĝo, kiun oni portas en la poŝo kaj kiun oni vidas sur la turo, estas poŝ-kaj tur-horloĝoj.
Ankaŭ estas aliaj.
Ankaŭ estas vekhorloĝo, murhorloĝo, k. c.
La maŝino moviĝas per risorto.
Oni streĉas la risorton.
Tial la maŝino funkcias.
Horloĝo havas ciferdiskon.
Ĉe la rando de la ciferdisko estas ciferoj.
Ciferoj signifas horojn.
Ankaŭ estas ĉe la rando streketoj aŭ linietoj.

Profesoro demandas:

Kio estas horloĝo?
Kion oni mezuras per ĝi?
Ĉu estas diversaj specoj?
Kiel oni nomas horloĝon, kiun oni portas en la poŝo, aŭ kiun oni vidas sur la turo?
Ĉu ankaŭ estas aliaj?
Ĉu ankaŭ estas vekhorloĝo, murhorloĝo?
Kiel la maŝino moviĝas?
Ĉu oni streĉas la risorton?
Kial la maŝino funkcias?
Kion havas horloĝo?
Ĉu estas ciferoj ĉe la rando de la ciferdisko?
Kion signifas ciferoj?
Ĉu ankaŭ estas linietoj aŭ streketoj ĉe la rando?

PRI LA BILDO.—Jen la aŭlo de la lernejo: malantaŭ granda masiva skribtablo, sur seĝego sidas la maljuna kaj malgrasa instruisto, kiu, tenante stangeton, aŭ lignomontrilon, aŭ montrobastoneton, klarigas lecionojn al la lernantaj knaboj aŭ lernantoj; de la muro, malantaŭ li, pendas kadro kun alegorio de la Respubliko. Delstren de la instruisto sur la sama muro mem, de sur hokoj enpenetritaj en la muro, kaj per ringoj ŝraŭbitaj en la lignaĵo de la nigra tabulo, ĉi tiu pendas. Sur la nigra tabulo aperas blanke ciferoj, diversaj signoj aritmetikaj, tiuj de la sumo, multipliko kaj subtraho; aperas rektaj linioj, du horizontalaj kaj unu oblikva inter la horizontalaj, preskaŭ ĝi estas vertikala; kaj inter la unua horizontala kaj la




oblikva, kurba linio. La knaboj ankaŭ sidas sur benkoj kunigitaj al la skribtabloj el ligno; ili tenas kraĵonojn kaj blankajn foliojn sur la skribtabloj kvazaŭ modestaj kaj simplaj pupitroj, el kiuj elvidiĝas la inkujoj.

La instruisto klarigas elementojn de la Geometrio, kaj li sin turnas al Hermeneŝildo dirante:

—Bonvolu, sinjoro Hermeneŝildo; aliru al la nigra tabulo kaj streku rektan linion.

PRI LA BILDO. — Antaŭ la nigra tabulo, maldekstren, etaras la instruisto kun la maldekstra mano jakenpoŝigita kun miranta sintenado vidante la linion strekatan de la malfeliĉa kaj simpatia larmulo. Ĉi tiu, kaŭze de siaj paŝoj flanken, dekstren, por streki la linion, kaj de sia granda lameco, pro sia balancigado, per la gipsaĵo, strekis la blankan linion ondiganta, zigzaga.




Streketoj montras minutojn.
Horloĝo havas du montrilojn.
Grandan kaj malgrandan montrilojn.
La unua montras la minutojn.
La alia taŭgas por montri la horojn.
La ciferdisko havas cirkleton sube.

La cirkleto havas montrileton.
La montrileto montras la sekundojn.
Jam estas la oka kaj duono.
Aŭ duono de la naŭa.
Estas kvarono antaŭ la naŭa.

Kion montras streketoj?
Kiom da montriloj havas horloĝo?
Ĉu grandan kaj malgrandan?
Kion montras la unua?
Por kio taŭgas la alia?
Ĉu havas sube cirkleton la ciferdisko?
Kion havas la cirkleto?
Kion montras la montrileto?
Kioma horo estas?
Kioma horo estas?
Kioma horo estas?

PRI LA BILDO.—La instruisto gratas sian mentonon, dum li staras kuntririginta kaj apogas sian maldekstran manon sur sia talio; kaj li demandas kaptite de miro:



—Ĉu tiu linio estas rekta? Ĉu, vi tiel bone atentis miajn klarigojn?

La lernanto respondas: —Atenti, atenti!... Tute jes... Sed okazas ke mi havas malbonan erton, saman, kia estas mia kruro... Se vi estus ordoninta al mi fari ondigantan linion, vi estus vidinta kian verfektan linion!...

PRI FUMADO

Profesoro diras:

Vi deziras fumi.
Vi eltiras tabakujon el via poŝo.
Vi deprenas ĝian kovrilon.
Vi malfermas tabakujon.
Vi elprenas el ĝi fumpaperetojn.

Profesoro demandas:

Ĉu vi deziras fumi?
El kie vi eltiras tabakujon?
Kion vi deprenas?
Kion vi malfermas?
Kion vi elprenas el ĝi?

**«ESTAS NECESE DONI ĈIAM ĈION FARITAN
AL LI»** (el la matena ĵurnalo «El Sol», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Vidu manĝoĉambrom de familio, en kiu ankoraŭ, sur la tablo, kuŝas la blanka tuko; en la fundo, ĉe la muro, staras ŝranko kun teleroj, vitraj potoj kaj ceteraj iloj kaj aĵoj por manĝi. Antaŭ la manĝotablo staras du personoj: unu, en ĉemizo, grasa, bonkora, sindonema, estas la mastro; la alia estas nevo de la unua. La dommastro alparolas milde al la nevo, kiel oni povas dedukti pro lia bonkoreco kaj sintenado, kun la brakoj oblikve malfermataj



kaj sternataj manoj, kvazaŭ akompanante peton per sia gesto. La nevo, kun mieno kvazaŭ de pentanto sed vere de hipokritulo mal-laborema, de parazito de la familio, de senhonta persono, kun la manoj en la poŝoj de la jakoj, aŭskultas hipokrite, senhonte.

La onklo diras: —Bonvolu, kiam vi eknavigacios? Kiam vi okupos postenon de ŝipo? Jam baldaŭ estos de unu jaro kiam vi alvenis al la hejmo de la onklo, ĝis kiam vi vin dungos al ŝipano de vaporŝipo por praktiki vian profesion, kaj...

—Mi ne havas ŝipon, onklo...

PRI LA BILDO.—En la sama ĉambro, post du jaroj, same staras la onklo kaj la nevo. La onklo apogas sian maldekstran pugnon sur la mentono, kiel pripensante, dum lia fleksita dekstra brako ripozas sur la dorsa parto de lia talio. La nevo, kun malgaja mieno, verŝajne volas konvinki la onklon pri sia senkulpeco.



La onklo diras : —Postmorgaŭ estos la dua datreveno de la tago, kiam vi eniris la hejmon ĝis trovi okupon...

—Jes, vi estas prava, kara onklo; sed mi ne trovas ŝipon, kaj... kion mi faros?...

Vi subtenas folieton kaj kovrilon per
via maldekstra mano.

Vi ŝutas tabakon sur la maldekstran
manplaton.

Poste vi fermas la tabakujon.

Vi enpoŝigas ĝin.

Vi ŝutas la tabakon sur la folieton.

Kion vi subtenas kaj per kio vi ĝin
subtenas?

Sur kien vi ŝutas tabakon?

Ĉu vi fermas poste la tabakujon?

Ĉu vi enpoŝigas ĝin?

Ĉu vi ŝutas la tabakon sur la fo-
lieton.

PRI LA BILDO.—En la sama ĉambro. Ankorau kuŝas sur la tablotuko teleroj kaj botelo da vino. La onklo, kun la maldekstra mano en la poŝo de la pantalono kaj gratante aŭ tuŝtante sian mentonon, staras antaŭ la nevo, kiu eble klarigas sian malbonan ŝancon por konvinki tiun.



—Atentu, nevo. Nepre vi eknavigacios, ĉar jam estas preskaŭ tri jaroj de kiam vi alvenis al ni, kaj pro vi ni elspezas multe... Elĉerpi kaj ne malo, morto de kapitalo...—diras la onklo.

—Sed, kion mi faros, ĉar mi ne havas ŝipon?—respondas la nevo.

Vi envolvas la tabakon en la foli-
eto.

Vi malsekigas bordon de la folieto
por alglui ĝin, kaj eviti, ke la ci-
garedo disigu.

Vi faldas unu el ambaŭ ekstremoj
de la cigaredo.

En kio vi envolvas la tabakon?

Kial kaj por kio vi malsekigas la
bordon de la folieto?

Kion vi faldas?

PRI LA BILDO.—La bona onklo, ĵus elirinte el ludilvendejo, ekpaŝas al sia hejmo portante kartonan skatolon kun io ĵus aĉetita de li. Oni povas vidi en la montrejo de la butikoj diversajn ludilojn, el ili, starantan pupon, gitaron, ĉaspafilon, trumpeton, tamburon, k. c.; sub la vitraĵo de la montrejo, oni povas legi: «ĈIO PO 0'95.»

Li, irante sur la trotuaro al la hejmo, pensadas:



—Tio, kio okazas, estas netolerebla. La gefiloj laboradas kvazaŭ sklavoj, kaj la nevo manĝante parazite dank' al la laboro de la gekuzoj... Ĉu li ne serĉas kaj trovas ŝipon, li multokaze revenas al hejmo balanciĝante kvazaŭ sur ferdeko de ŝipo en furioza maro!...

Vi subtenas la cigaredon per la lipoj.

Vi eltiras skatolon da alumetoj.

Vi prenas alumeton, kies flamiĝeman ekstremon vi frotas.

La flamiĝema ekstremo flamiĝas kaj la alumeto ekbruliĝas.

Kiel vi subtenas la cigaredon?

Ĉu vi eltiras skatolon da alumetoj?

Kion vi prenas, kaj kion vi frotas?

Kio flamiĝas, kaj kio ekbruliĝas?

PRI LA BILDO.—En la aludita manĝoĉambro, en kiu sur la manĝilarŝranko oni rimarkas vitran poton da akvo. La onklo tenas malgrandan velsipeton, ludilon, kiun li aĉetis en la butikoj kaj montras ĝin al la nevo, kiu mirigate, en plena surprizo, staras flanken de la onklo.



La onklo diras: —Ĉu vi diris, diradis, ke vi ne havis ŝipon? Nu; mi jam trovis ĝin. Mi ĝin donacas al vi, komandu ĝin... Vi jam povas rondiri la mondon pli kaj pli!...

La alumeto brulas, kaj vi alproksimigas ĝin al la pinto de la cigaredo, dum vi suĉas ĉi tiun.

Vi, tiel, ekbruligas la cigaredon.

Vi enspiras la fumon, kiun vi poste elspiras.

Vi estingas la alumeton, jetante ĝin sur la plankon.

Ankaŭ oni uzas bruligilon, anstataŭ alumeto, multfoje ĝi estas aŭtomata.

Ĉu la alumeto brulas, kaj ĉu vi alproksimigas ĝin al la pinto de la cigaredo, dum vi suĉas ĉi tiun?

Ĉu vi, tiel, ekbruligas la cigaredon?

Ĉu vi enspiras la fumon, kiun vi poste elspiras?

Kiel vi estingas la alumeton?

Kion oni uzas anstataŭ alumeto?

Profesoro diras :

Oni premas risorton de aŭtomata bruligilo, ĝia kovrilo saltas kaj fajreroj ekbruligas meĉon trempitan el benzino.

Post kiam oni ekbruligis la cigaredon, oni estingas la flamon de la meĉo per blovo, kaj oni fermas la bruligilon.

Oni povas fumi cigaredojn, kiujn oni povas aĉeti faritajn.

Ankaŭ cigaron aŭ tabakon per pipo.

Oni povas enmeti cigaredojn en cigaredujon, kaj por fumi ilin oni povas uzi cigaredingon.

La sekvantaj temoj nur montras la frazojn kiujn diras la profesoro, ĉi tiu faros la demandojn, kaj la lernantoj la respondojn ĉiel montras la unua temo.

Profesoro demandas :

Kiel oni ekbruligas aŭtomatan bruligilon?

Kiel oni estingas la bruligilon, kaj kion oni faras poste?

Ĉu oni povas fumi cigaredojn, kiujn oni povas aĉeti faritajn?

Kion ankaŭ oni povas fumi?

Kien oni povas enmeti cigaredojn, kaj kion oni povas uzi por fumi ilin?

K O R E S P O N D A D O

Mia amiko havas korespondanton kaj korespondantinon.—Li de antaŭlonge korespondadas kun siaj geamikoj.—Ili interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn.—De tempo al tempo li skribas leteron.—Kaj iam li skribas per krajono.—Sed ĝenerale li skribas per inko.—Fojojn li uzas verdan inkon.—Hodiaŭ li skribas leteron al amikino.—Li elprenas paperon kaj koverton el tirkesto de la skribtablo, kaj metas ilin sur la paperujon.—Li trempas la plumon kaj skribas adreson sur la koverton.—Li ekekribas, unue la daton.—Li datumas la leteron.—Li redaktas la leteron.—Fine, li subskribas ĝin, kaj sekigas la skribaĵon per sorbapapero.—Poste li faldas la leteron, kaj ĝin enmetas en la koverton.—Per peniko akvotrempita li malsekigas gumon de la rando de la koverto.—Farinte tion, li alpremas la randon glufemante tiel la leteron.—En la poŝtofiĉejo li afrankas la leteron per poŝtmarkoj.—Tiam li ĵetas ĝin en la leterkeston de la poŝtofiĉejo.—La poŝtmarkoj estas diversprezaj.—Certe la amikino ricevos la leteron.—Kiam la amikino ricevos la leteron, ŝi disŝiros la koverton, ŝi eltiros, malfaldos kaj legos ĝin, kaj ŝi ĝojos pro la novaĵoj esprimataj de la amiko.—Vi ne devas meti neafrankitan leteron en poŝtofiĉejo, ĉar tiam ricevonto pagos la punafrankon.—Ankaŭ ne utiligu uzitan poŝtmarkon, ĉar pro tio oni monpunos vin.—Per poŝtofiĉejoj ankaŭ oni povas sendi monon kien ajn.—Estas poŝta ĝiro, oportuna kaj malkara rimedo por tiu afero.—Tiu poŝta ĝiro preskaŭ estas internacia.

«**POR PAFTRAFI DE LONGE**» (el la ĵurnalo «El Sol», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Jen du maljunuloj unu kontraŭ la alia. Ili estas vaskaj marbordvilaĝanoj; unu el ili estas eksmaristo, kiel oni povas konstati per lia kostumo, per lia barbo laŭ marista kutimo kaj per lia starmaniero kun larĝe malfermitaj kruroj kvazaŭ por rezisti la balancigadon de la ŝipo pro la batoj de la marondoj. La alia estas



ĉasisto, de kies maldekstra ŝultro pendas ĉaspafilo kaj sako; altaj botoj ŝirmas la piedojn de la ĉasisto. Ĉashundo kvazaŭ aŭskultas la konversacion.

La eksmaristo diras: —Ĉu vi trafas bone ĉasante, Mikaelo?

—Ne, tute ne! Mia vido jam laciĝis, kaj mi nur trafas vidi malhele, konfuze la silueton...

—Facile estas eviti tion... Mi pruntedonos al vi lornon por vidtrafi malproksimen...

EN KAFEJO

Kelkaj amikoj eliras kune el fabriko.—Unu el ili diras al ceteraj.—Morgaŭ estos dimanĉo; tial ni kunvenos en la kafejo aŭ bierejo,

PRI LA BILDO.—Jen, la maljuna ĉasisto sidas kaj li alligas la lornon al la ĉaspafilo; de la seĝo, sur kiu sidas la ĉasisto, pendas la ĉasako; kaj la ĉashundo, ankaŭ sidante kontraŭ la mastro, atente rigardas tion, kion faras la ĉasisto, kvazaŭ ĝi volus scii la faron



de la mastro, kvazaŭ ĝi estus kuriozema, scivolema al tio, kion la mastro faras. La ĉasisto diras al si mem:

—Bonan ideon havis Hermeneŭildo, la maristo... Mi ligas la ilaĉon al la ĉaspafilo... Tre bone mi vidos... ĉar antaŭe mi estas rigardinta de la fenestro...

kjel kutime, laŭ via deziro.—Unu el la ceteraj esprimas sian deziron, dirante: estas preferinde kunveni en la kutima kafejo, ĉar en ĝi oni servas ankaŭ bieron eĉ manĝaĵojn, kiel en restoracio.—Ĉiuj konsentas pri la propono de la lasta.—La dimanĉon posttagmeze ĉiuj rendezvuas.—Ni renkontas ilin sidantaj ĉirkaŭ tablo.—Unu el ili gaje diras: Sinjoroj (S-roj), mi invitas vin, ĉar mi havis grandan ŝancon, tial ke mi heredis de nekonita parenco, kiu ĵus mortis en Ameriko.—Ĉiuj miras pro tio, kaj unu el ili diras, tial ni devas gratuli vin anstataŭ kondolenci.—La gratulito vokas kelneron per manĝlaĉo, kaj dum la kelnero estas alkuranta, li demandas al siaj amikoj kion ili ŝatas manĝi

PRI LA BILDO.—La bildo vidigas la vidkampon de la lorno, en kiu aperas aŭ elvidiĝas du birdoj sur branĉoj de ĉerizarbo, kies frukto ankaŭ elvidiĝas granda same, kiel la folioj, pro kio la maljuna ĉasisto diras kontentege:



—Tre proksimen, kvazaŭ ĉe mia nazo, mi vidas du birdojn sur la ĉerizarbo de Simon, trans la riveron... Granda vidtrafo! La birdoj estas vidataj kiel se ili estus kokinoj preskaŭ...

ĉaj trinki.—Iu diras: mi trinkos ĉajon kun lakto.—Alia diras: mi nur nigran ĉajon.—Alia: mi preferas glason da biero.—Alia: mi ŝatas laktoĝlaciaĵon.—Alia: mi citronglaciaĵon.—Alia: mi soifas, tial mi trinkos refreŝigan siropon el groso.—Alia: mi gustumos ĉokoladon kun biskvito.—Tri ceteraj: ni trinkos poĉaletojn da rumo, konjako ĉaj brando.—La invitanto mendas al la alvenanta kelnero la trinkaĵojn.—La kelnero revenas kunportante ĉion sur granda pleto, kiun li metas sur la marmortablon, ĉaj li disdonas trinkaĵojn.—Tiu, kiu trinkas ĉajon kun lakto ĉaj nigran ĉajon, ĵetas sukerpecojn en la trinkaĵojn por dolĉigi ilin.—Ili agitas ĉaj gustumas la trinkaĵojn.—Kiu glutas la glaciaĵojn ilin sorbas per pajlo.—La ĉokoladon oni manĝas trempante en gin

PRI LA BILDO.—Ĉi tiu prezentas la kamparon en kiu oni vidas arbojn, kreskaĵojn, tegmenton de domo trans la riveron, kiu fluas antaŭ la ĉasisto pafanta kaj antaŭ la ĉashundo plilongiganta la kolon kaj leviganta la kapon kvazaŭ por atenti la falon de la vundotaj



birdoj prenotaj de ĝi. Oni vidas la fumon de la pafilo. La ĉasisto diras :

—Iom pli, ol konvenas, pezas la ĉaspafilo ; sed tre bone mi povas fari la pafrigardon... Fulmoj !... La birdoj forflugis !...

biskvitojn.—La ceteraj trinkas siajn trinkaĵojn iom post iom.—Dum la trinkado ili parolas pri diversaj aferoj, kaj samtempe muzikistaro amuzas ilin.—Tamen, loteria vendisto ĝenas ilin, ĉar li obstine volas vendi lotbileton dirante: «aĉetu ĉi tiun lotbileton, mi havas feliĉon».—Ili ĝentile petas lin, ke li foriru, sed kiam li foriras alvenas ĵurnalvendo, ekŝriante: «terura katastrofo!».—Ili aĉetas ĵurnalojn, ĵuajn ili tralegas.—Post la legado, ĵuaj ĉagrenas ĉiujn, ili komentarias la kaŭzon de la katastrofo, kies viktimojn oni kompatas.—La invitinto ree vokas la kelneron, kaj diras al li: «faru la kalkulon».—La kelnero faras la kalkulon, kaj unu el la ĉeestantoj intencas pagi, sed la invitinto malpermesas tion, ĉar li invitis, kaj tial li rajtas pagi.—Li pagas kaj donas trinkmonon por la kelnero.

PRI LA BILDO.—La ĉasisto, reveninte al la vilaĝo, redonas al la eksmaristo la lornon, pro kio ĉi tiu sin turnas al la ĉasisto dirante

—Ĉu vi ankaŭ ne vidas bone per ĉi tio aŭ kio okazas?



—Ĉu vidi? Tre bone, ja; sed se la vidtrafo estas longa, male por la ĉaspafilo, kies ŝargo ne atingis la rigardcelitaĵon!...

SEPA TEMO.—Ĉeesti teatron prezentadon

Je la vespero, elirinte el la kaŝejo, ili iras en teatron.—Alveninte al la biletovendejo, ili diskutas pri la lokoj kies biletojn ili devos aĉeti, ĉu loĝion, apogseĝojn, aŭ seĝojn de amfiteatro.—Ili fine decidis aĉeti apogseĝojn de unua vico, apud la orkestrejo.—Iu demandas la koston de la bileto, sed ĉar neniu scias ĝin, alia legas la prezojn notitajn sur la afiŝo.—Ĉiu elpoŝigas sian monujon, malfermas ĝin, elprenas el ĝi la monon kaj pagas al la biletoendisto la bileton.—Enirante en la teatron, oni prezentas la bileton al pordisto, kiu forŝiras de ĝi la kuponon.—Ili eniras en la salonon, iras al siaj apogseĝoj, kaj lokumas ilin teatrociclisto.—Ili sidigas kaj atendas, ĝis kiam oni levas la kurtelon kaj komencos la prezentadon.—Ĵus la orkestro ekludis.—Tre

«KOLERO ESTAS MALBONA KONSILANTO»

(el la ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRI LA BILDO.—En cerealejo staras vilaĝano, alparolante al alia surgenuiĝinta kaj falĉanta verdan hordeon por nutri la azenojn,



mulojn kaj ĉevalojn. La falĉanto havas tre longan nazon, pro kio la vilaĝanoj ĉiam kaj ĉie ŝercas al li. La staranta vilaĝano diras al la nazegulo:

—Vi devas atenti multe kaj zorgi ne erari kaj falĉi vian nazon, opiniante ke ĝi estas hordeo...

klare oni aŭdas sonojn de harpo.—Klarnetoj, hobojoj, trumpetoj, flutoj, violonoj, liro, tamburoj, piano kaj aliaj muzikaj instrumentoj mikŝas harmonie la akordojn, kaj rezultas rava valso.—Ili diskutas pri muzikaj motivoj.—Oni aŭdas demandojn de unu el ili: ĉu vi ŝatas operon?; ĉu vi preferas dramon aŭ komedion?—Ni aŭskultu la opiniojn:—Mi juĝas operon inda je nia atento—diras unu el ili.—La opereto estas amuziga—opiniis alia. La dramo, kaj super ĉio la tragedio, tro kortuŝas eĉ terurigas—diras alia. La komedio preskaŭ ĉiam, des pli se ĝi estus sprita, interesas, gajigas, kaj tial oni pasigas agrable la

PRI LA BILDO. — La nazegulo, apogante sian dekstran brakon sur sian dekstran kruron kaj tenante la falĉilon, diras :



—Ĉu vi opinias, ke mi estas idioto kaj ke mi tranĉos mian nazon? Iru, iru aliloken por moki aliulon... Sajnas kiel se vi ne havus ankaŭ!... For, for, lasu min...

tempon, kaj krom tio instruas—diras alia.—Jes, vi estas prava, mi preferas pli ridi, ol plori; pli amuziĝi, ol kortuŝiĝi—ekŝrias alia.—Oni levas la kurtenon kaj aperas la scenejo, kies kulisoj kaj scenpentraĵoj estas belaj.—Tre bone ludis opereton la aktoroj, kiuj kantis bone kaj ridigis niajn konatojn.—La aktoroj sin karakterizis sufiĉe bone.—Je la noktomezo niaj konatoj eliris el la teatro kaj sin direktis en siajn hejmojn.

OKA TEMO.—Ekskurso al la marbordo

Kelkaj amikoj projektis kaj organizis vojaĝon, viziton al norda marborda urbo.—Je la morgaŭa tagiĝo ili forveturos.—De tre frue il. preparas, aranĝas kaj pretigas siajn valizojn kaj paktaĵojn.—Ili alvenas al stacidomo per aŭtomobilo, fiakro, omnibuso kaj tramo.—

PRI LA BILDO.—La falĉisto de la nazego estas parolanta al la ŝercemulo aŭ mokanto, prenante faskon el hordeo kaj pretigante la falĉilon por falĉi la prenatal faskon, dum la mokanto staras antaŭ li kun la manoj enpoŝigitaj en la pantalono kaj aŭskultas. La mokito diras :



—Falĉi la nazon!... Ĉu vi ne vidas, kiel mi prenas la faskon el hordeo?—kaj ĉi tion li diras kolerigate de la moko, aldonante: —Por falĉi la nazon anstataŭ preni same, kiel mi faras...

Ili eniras en la stacidomon kaj petas je ĥasisto biletojn de tria klaso por la rapida vagonaro en urbon...—Ili jam tenas siajn biletojn, kaj portistoj prenis valizojn kaj pakajojn.—Ĉiuj marŝas al la perono, sed antaŭ ol eniri oficisto devigas la vojaĝantojn prezenti la biletojn, kiujn tia trapikas kaj redonas al ili.—Ili eniras en la peronon, iras en la pretigitan vagonaron kaj okupas kupeon de vagono, kaj la portistoj metas la valizojn kaj pakajojn en difinitajn lokojn.—Subite oni aŭdas fajfilon, kaj tuj akran, longan fajfadon de la lokomotivo kaj samtempe la bruon, kiun kaŭzas la eliranta vaporo.—La vaporo movas meĥanisman de la lokomotivo, la meĥanismo rulas la radojn de la lokomotivo, kiu trenas la vagonojn.—La vagonaro ekveturas.—Baldaŭ la vagonaro

PRI LA BILDO.—La kolero frenezigas la falĉiston, kiu aperas prenante sian nazegon kaj falĉante ĝin, kiel elpruas la vundo kiu sangelgutas, mirigante la starantan vilaĝanon, ĉar la falĉisto, fre-



nezigate de la moko, akompanas per ago la jenajn parolojn, kiuj kompletigas la diron de la antaŭa bildo :

—...tiel mi devus preni kaj fari!...

trairas belan ĉamaron.—La vagonaro trairas laŭlonge belan valon.—La valo mirigas la vojaĝantojn.—Ĝi estas kvazaŭ belega kaj grandega parko kun vasta kaj verda tapiŝo.—Vilaĝoj, urbetoj, fabrikoj, arbaroj, fruktoĝardenoj, ĝardenoj kun villoj nuanças tiun tapiŝon, kiu ravas la rigardantojn.—Ĉarma kaj trankvila, kvankam larĝa kaj profunda rivero, sur kiu flosas barĝoj, fluas tra la valo.—La rivero disdonas sian akvon per multenombraj kanaloj al industriejoj kies maŝinojn ĝi movas, kaj ankaŭ per ĝia akvo oni surverŝas la kulturitajn fruktoĝardenojn kaj ceteron de la ĉampero. Estas tagmezo kaj la vojaĝantoj sin preparas por tagmanĝi en la restoracia vagono, aŭ en la kupeo mem siajn kunportatajn manĝaĵojn.—La vagonaro alvenas al la piedo de altega montaro.—La fervojo supreniras zigzage sur la deklivo.—De la mezo

«LA FIŝKAPTEMULO KAJ LA RIGARDANTO» (el la nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Antaŭ longa monto ĉe la fono staras konstruaĵoj de mara urbo kun vasta haveno, kies kajojn oni vidas. De post havenkajo la suno ekleviĝas. Sur la bordo de la maro, dua-



fone, dekstren de la rigardanto, oni vidas piediranton, kaj unuavice, apud de arbo, sidantan sur roko, kun korbo kaj ledvinujo ĉe lia dekstra flanko, kanfiŝkaptemulon.

de ĥrutaĵo la vidaĵo estas belega: oni rigardas suben la belan valon kaj ĉarman riveron kvazaŭ arĝentan serpenton; supren, densajn arbarojn, kaj sur la pintoj de montoj, eternajn neĝojn.—Oni povas rigardi grandan akvoĉalon, kiun formas la akvo devenanta el fandita neĝo.—Ju pli oni supreniras, des pli oni sentas malvarmon pro la proksimeco al la neĝoj.—La suno jam subiras, kaj rapide noktiĝas, ĉar la vespera krepusko estas mallongedaŭra.—La vagonaro alvenas al tunelo. Ĝi pasas sub la monto kaj preteriras la alian ĥrutaĵon, deklivon.—Niaj ĥonatoj malsatas, kaj ili sin preparas vespermanĝi en la restoracia vagono.

PRI LA BILDO.—La pejzaĝo estas la sama; la kanfiŝkaptemulo pacienceme atendas, ke fiŝo, avida manĝi ĉu lumbrikon, ĉu vermon, ĉu alian insekton aŭ ŝatataĵon de la fiŝoj, mordu la manĝaĵon kovrantan la perfidan ŝtalhokon, en kiu la trompita fiŝo restos alkröcita, kion la fiŝkaptemulo scios vidante ke la korko, tra kiu estas almetita kordo subtenanta la hokon, kaj kiu estas ĉe la ekstremo de forta



eilkkordono delikata iranta de la ekstremo de la kano, laŭlonge ĉi tiu tra metalaj ringoj, al la manoj de la fiŝkaptemulo; vidante ke la korko malaperu sub la supraĵo de la akvo kaŭze de la tiro farita de la fiŝo sentanta sin vundata de la akra ŝtala hoko. La piedirinto de la unua bildo, kun la manoj en la poŝoj de la pantalono, kuriozeme staras atendante ke la fiŝkaptemulo trafu fiŝon, li kun troa pacienco atentas kaj atendas dum la kanfiŝkaptemulo sensukcese atencas fiŝon, ĉar la suno sufiĉe alteniĝis elpruvante pasadon de horoj.

NAŬA TEMO. — Vespermanĝo en la restoracia vagono

Jen la vojaĝantoj sidantaj ĉirkaŭ la tabloj. — Puraj tablotukoj kovras la tablojn. — Sur ĉiu kuŝas teleroj, tranĉiloj, forkoj, kuleroj, pokaloj,

PRI LA BILDO.—La diferenco de ĉi tiu bildo al la antaŭaj estas nur, ke jam alvenis la tagmezo, kaj pro ĉi tio la kanfiŝkap-



temulo, subtenante per la kruroj la kanon, kun atentema fiksa rigardo en la korkon aŭ flosantaĵon, manĝas kaj trinkas.

glasoj, buŝtukoj, botelo da akvo, salujoj, spicujoj, bulĵoj; kaj en la centro listo de manĝaĵoj.—Jen la listo, la menuo:

Bulĵono

Supo el rizo.	Trutoj stufitaj.	Stufaĵo de ŝafido.
» » fabo.	Sardinoj frititaj.	Rostita lumbaĵo de bovino.
» » lento.	Gado ĵuirita.	Fritita kotleto de porko.
» » pizo.	Salmo rostita.	Rostaĵo de bovino.
» » fazeolo.	Merlango kun saŭco.	Bifŝteko kun terpomoj.

Ovaĵoj, ŝinĝo, ĥolbasoj, butero, olivoj.


Salatoj: laktoĉo, celerio.

Desertoj: diversaj fromaĝoj, migdaloj, persikoj prunoj, piroj, pomoj, ĥonfitaĵoj, ĥukoj.

Biero, vinoj kaj likvoroj diversaj, ĥafo kaj teo.

La vojaĝantoj elektas tion, ĥion ili pli ŝatas kaj petas porciojn

PRI LA BILDO.—La sceno estas sama, kia estis la dua, sed la suno alvenas al la momento de la kuŝiĝo, kun la sama malsukceso por la kanfiŝkaptemulo.




ĉaj boteletojn da vino ĉaj biero.—Ĉiuj vespermanĝas sufiĉe ĉaj revenas en siajn kupeojn.—La plimulto sin preligas ripozi ĉiel eble plej bone, ĉiel eble plej komforte, ĉaj tial ke la vetero estas iom malvarma, iuj malvolvas la manpakajojn elprenante el ili lanajn kovrilon per ĉiuj ili sin kovras.—Baldaŭ iuj dormas, kelĉaj eĉ ronĉas ĉaj eble iu sonĝas.

DEKA TEMO.—Alveno al marborda urbo

Je la ĉvara matene, revizoro iras de kupeo en kupeon.—Li petas la fervojbiletojn, sed ĉar multaj vojaĝantoj dormas, li estas devigata vekti ilin.—Li tuŝas ĝentile la ŝultrojn de la dormantoj, ĉaj fojon li ĵrapetas ronĉanton por vekti lin, dirante samtempe: «Pardonu Sinjoro (S-ro.), bonvolu doni al mi la bileton».—Li anoncas al la vojaĝantoj la tutan alvenon.—Ĉiuj sin preparas forlasi la vagonaron.—La lokomotivo fajfas ĉaj tuj la vagonaro haltas.—La grupo el amikoj, ĉiun ni ĉonas, donas la valizojn ĉaj pakajojn al portistoj.—Ili eliras el

PRI LA BILDO.—La nokto sternis sian ombron, kiun ekŝiras la ekleviganta luno, kiun spegulas la serena supraĵo de la akvo en la haveno. La malsukcesinta kanfiskaptemulo kaj la paciencema rigardanto staras, la unua preta reveni al la hejmo, kun la kano sur la dekstran ŝultron kaj tenante la korbon; la dua alparolas al la unua kaj akompanas la parolojn per gesto kvazaŭ ŝraŭbante en la tempion, dirante :



—Tutan tagon, de la sunleviĝo ĝis la nokto, tenante la kanon...; sendube io, en via kapo devas esti ŝraŭbata!...

—Bonvolu atenti: kiamaniere, do, estas via kapo, kiam ne tenante kanon aŭ ion vi pasigis la tempon nur por rigardi? Kun truoj kaj fendoj, plena je akvo, kiel por droni!...

stacio kaj supreniras en aŭtomobilon de la «Universala Hotelo», dum la portistoj metas la valizojn kaj pakajojn sur ŝarĝaŭtomobilon de la sama hotelo. — Ili pagas la servon. — La aŭtomobilo enkondukas ilin en la hotelon. — En la vestiblo de la hotelo, ĉe la sojlo de la pordo, atendas la mastro, kiu diras al ili bonvenon. — Oficisto registras iliajn nomojn en la hotela registrolibro. — Servisto goidas ilin por montri al ili ĉambrojn. — Ili supreniras ŝtuparon ĝis la ĉefetaĝo, kaj tra vasta

KIU ESTAS BAGARIA?

Bagaría estas tre sperta kaj genia karikaturisto, li estas tutmond-fama, vera majstro inter la majstroj de la karikaturado; li eĉ kreis trafantan desegmanieron impresantan, ĉar li sciis lerte kaj inteligente kunigi al sia arto tre efike trafantan ironion, instruon, moralecon kaj ĉion aktualan de la plej demokratia vidpunkto.

«**KONSCIENCORIPROĈO**» (Blanka historieto por ne mirigi la moralistojn, el la ĵurnalo «El Sol», de Madrido).



PRI LA BILDO.—Okazas la sceno dum la vintro. Trastrato piediras riĉa markizo, fumante bonegan cigaron; li, tre elegantanta, sin ŝirmas kontraŭ la frosta vetero per surtuto el feloj. Maljuna almozpetanto petegas je li almozon, kaj la malriĉulo sin klinas antaŭ la markizo kun gesto humila kaj ĝentila tenante la makulitan ĉapelon ĉifonan. La markizo ĵetas kvinpesetan arĝentmoneron en la koton kaj diras:

—Ĝi estus por vi se vi prenus ĝin per la buŝo.

PRI LA BILDO.—Jetinte la moneron, la markizo rigardas kiel la genufleksiĝinta malfeliĉulo penadas celi la moneron, preni ĝin laŭ la diro de la markizo: «Via estus la duro se vi prenis ĝin per la buŝo.»



koridoro la servisto montras al niaj ĉambroj komfortajn ĉambrojn bone meblitajn, eĉ lukse, kun balkonoj al la strato.—La koridoro estas ampleksa kaj ĝin aerumas vastega korto per fenestroj.—En ĉiu ĉambro estas ŝranko, apogseĝo, seĝo, tualeta tablo kun lavovazo kaj kruĉo, spigulo, noktotablo, glaso kaj botelo da akvo, bona lito kun molaj matracoj kaj kapkusenoj, kaj puraj litotukoj, kurtenoj, pendigiloj, elektraj lampoj sur la muro kaj pendantaj de la plafono, kaj tapiŝo sur la planko.—Ĝi estas bona hotelo kun kvin etaĝoj krom subteg-menta etaĝo aŭ mansardo, kaj ampleksa teraso.—En la teretaĝo oni trovas la manĝejon, kaj apartajn salonojn por legi, skribi kaj studi; fumi; por ludi bilardon, ŝaĥon aŭ kartojn; por koncerti kaj danci.—En la subteretaĝo niaj ĉambroj vizitas la kuirejon kaj provizejon.—En la kuirejo ili rimarkas benĉojn, kaserolojn, kaldronojn, potojn, ĉestojn,

PRI LA BILDO.—Jen la cigarrestaĵo sur la pavimo. La malfeliĉulo staras kun la duro subtenata de la lipoj, kaj kun la frunto, nazo, vangoj, barbo, k. c., tutplene makulitaj el la koto. La markizo elvidiĝas kvazaŭ pentanta.



patojn, ĥorbojn, barelojn, sitelojn, saĥojn, pladojn, pletojn, telerojn, tasojn, funelojn, k. c.—Ankaŭ estas tie forno.—La forno, fajrujo, kaj ĥamentuboj estas feraj kaj brilantaj pro delikata pureco.—La estro de la ĥuiristoj kaj ĥuiristinoj estas grasa blonda viro, tre simpatia, ĥiu viglas kaj zorgas atente pri ĉio.—Niaj ĥonatoj ŝercas pri lia pozo, ĉar li gravigas sian postenon.—Ankaŭ ili vizitas la banejon.—La necesejoj estas higienaj.

DEKUNUA TEMO.—Ili vizitas la urbon

La pavimo de la straroj, ĥiuj estas tre ampleksaj, estas bonega.—La urbo havas ĥartalon aristokratan, ĥie staras belaj kaj artaj arĥitekturaĵoj.—Laŭ ĉio oni rimarkas, ĥe la urbo estas progresema.—Ĝi

. **PRI LA BILDO.**—La markizo alparolas al la malfeliĉulo, tenante bankbileton el kvin duroj, dirante :



—Ĉi tiuj kvin duroj estus viaj se vi forte manbatus mian vizaĝon. Kaj tute sekve la kapricema markizo estis obeata.

posedas bonajn retojn de telegrafo, telefono, tramo, kanalo, kaj por disdoni puran akvon el grandaj kaj higienaj akvujoj provizataj de bonaj filtroj.—Oni trovas en ĝi ĉiujn signojn de la civilizacio: palacojn, monumentojn, muzeojn, statuojn, vastajn placojn, ĝardenojn, promenejojn, parkojn, kies belaj plantoj kun floroj kaj foliplenaj arboj ornamas ilin kaj parfumas la aeron.

Ne mankas komfortaj kluboj, kazinoj, teatroj, cirkoj, gastejoj; potencaj financaj firmoj, bankoj, borso; lernejoj, institutoj, kolegioj, universitato, akademioj; kasernoj, preĝejoj, temploj, katedralo, juĝejoj; gravaj industriejoj, fabrikejoj, magazenoj, bazaroj, butikoj, apotekoj, haloj; hospitaloj, kampoj, arenoj por ĉiaj sportoj.

Ĝi havas belan marbordon kun banejoj, kaj tre vastan kaj gravan

«**ALIA KONSCIENCORIPROĈO**» (el la nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido), de Bagaría.

PRI LA BILDO.—Sur brakseĝego kvazaŭ trono sidadas fieraj kaj kruela estro, ne reĝo, sed tiel absolutema, kiel reĝo de la mezepoka tempo, diktatoro, kiu tute same piedpremas la popolon, kiel



la molan kusenon, kiu kuŝas sub liaj piedoj. Dekstren de li estas pordo kun luksegaj kurtenoj, kaj maldekstren de la apogseĝego ĉe ĉi tiu, oni vidas sceptron, kiu oblikve staras apogate en la muro. Bagaría, per granda ironio, diras :

—En malproksima lando, kies nomon mi ne volas rememori, estis diktatoro, kiu, subite, fariĝis malgaja kaj kortuŝema...

havenon kun grandaj dokoĵ kaj havenkaĵoj. Ekstere, sur altaĵeto, oni rimarkas masivan ŝtonan konstruaĵon kun fortaj kradoj en la fenestroj de ĝia fasado, ĝia aspekto timigas; ĝi estas karceroj, kies pordoj estas feraj kun fortaj seruroj kaj rigliloj por ŝlosi la ĉelojn de la malliberigitaj.

Apud la urbo sur monteto, oni konstruas artan palacon. Ĝi ŝajnas

PRI LA BILDO.—Jen li, ankaŭ sidante en la kamparo, apud du cipresoj, laŭ sintenado elmontranta profundan enpensigemon; li ĉiufoje estis pli malgaja kaj ĉagrenata, pro kio lia servutularo diris: —Kio okazas al la diktatoro?



formikejo pro la granda nombro da laboristoj, kiuj tie laboras fervore. Oni permesas al rajtigataj personoj viziti la konstruaĵojn eĉ inspekti detalojn, ili povas vidi: masonistojn, kiuj starigas murojn el brikoj, ŝtonoj, cemento, kalko kaj gipso; ĉarpentistojn, kiuj hakas, segas kaj rabotas la lignaĵojn; meĥanikistojn, kiuj starigas feran trabaĵojn; skulptistojn, kiuj skulptas, gravuras kaj ĉizas la lignon kaj marmoron; pentristojn, kiuj pentras ĉambrojn, k. c.

Rigardante de tiu monteto, niaj konatuloj admiras la belan ĉirkaŭaĵojn kaj belajn vidaĵojn, kiuj allogas kaj plezurigas ilin.

DEKDUA TEMO.—Ili vizitas ŝipon en la haveno

Promenante sur havenkajo, unu el niaj konatoj sentas bateton sur sian dekstran ŝultron: Li turniĝas kaj sin trovas antaŭ amiko sia, kiu estas maristo.—Ili brakpremas kaj demandas sin reciproke.—La maristo

PRI LA BILDO.—Antaŭ la diktatoro sidanta en la palaco staras unu el liaj stultaj ministroj, kiu sin turnas al tiu dirante:



—Diktatora Moŝto, kio okazas al vi de post kelke da tempo? Ĉiuj viaj servantoj, ni, estas ĉagrenataj.

diras: «mi komandas grandan vaporŝipon, kiu ankriĝis antaŭ tri tagoj, kaj hodiaŭ oni finos ŝarĝi komercaĵojn, kaj morgaŭ je la naŭa matene ni ekveturos. Mi invitas vin kaj viajn amikojn akompani min kaj viziti mian ŝipon. Vidu ĝin en la centro de la haveno. En mia kajuto ni trinkos vinon de Jerez kaj ni tostos je nia feliĉa renkontiĝo kaj sano». Ĉiuj akceptas la proponon de la ŝipestro.

Ili ekiras al enŝipigejo, kie atendas la ŝipestron ŝalupo. Ĉiuj enŝipiĝas apud la ŝipestro, kiu prenas la timonon kaj ordonas remi al la remistoj, kiuj remas kaj ŝovas la ŝalupon tra la trankvila kaj verdblua supraĵo de la haveno; la remiloj ritme plaŭdas la akvon. La ŝalupo alvenas al flanko de la ŝipo, kie estas ŝtuparo. Ĉiuj supreniras sur la ferdekon, kaj niaj konatoj miras ĉar la ŝipo ŝajnas naĝanta aŭ

PRI LA BILDO.—En la sama loko, la diktatoro alparolas al la ministro, dirante laŭ jene :

—Nu; atentu, mi diros al vi tion, kio okazas al mi: mi havas



konsciencodoloron, kiu ne permesas al mi vivi. Pasintan tagon, dormante, mi sonĝis, ke iuj ribelis revolucie kontraŭ mi, kaj mi, tute nature, tuj mortpafis ilin. Kaj jen mia doloro, ĉar se mi estus sciinta, ke mi nur sonĝis, mi estus pardoninta ilin!

flosanta frenezulejo. Ĉie amaso da maristoj kaj personoj okupitaj; freneze laborantaj.

Sur la ĉefa ferdeko estas aliaj du ferdekoj, kiel duetaĝa domo kun multaj komfortaj kajutoj kaj salonoj por ludi, danci, fumi, legi, manĝi kaj amuziĝi per bilardo, ŝako, k. c. Sur la ponto staras la ĉambreto de la piloto, kaj poste, du grandaj kamentuboj. En la ĉefa ferdeko oni rigardas levmaŝinojn, ŝnuregojn, ĉenojn, kablojn, boatojn, vaporŝalupon, kaj kvar graciajn mastojn leviĝantajn kontraŭ la ĉielo kun iliaj vergoj, ŝnuraĵoj, veloj kaj ŝnurŝtuparoj, de kies pintoj pendas flagetoj, kiujn la venteto ondigas; en la balustrado, pretiĝitajn naĝ-

«INTERNACIAJ FANTAZIEMULOJ» (el la nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido), de Bagarí.

PRI LA BILDO. — Tre serioze piediras tra bulvaro tri



amikoj: Von Pilsan, germano, en la centro; Talarinni, italo, maldekstre de la germano, kaj dekstre de ĉi tiu la andaluziido García, kiuj direktas sin al Kafejo por trinki iujn pokalojn da vino.

ilojn; en la flanko de la ŝipantaŭo, ankron; en la ŝipposto, timonon, kaj de tiu loko, se oni sin klinas eksteren, super la maran supraĵon, tra la kvietaj akvoj, du ŝraŭbojn aŭ helicojn, kiuj antaŭenpuŝas tiel grandan flosantan urbon. En la internaĵo oni trovas ĉelojn, provizejojn, en kiuj ankaŭ oni konservas la viandon per glacio, maŝinhalon, vera infero pro la varmo kaj bruo, kie laboras maŝinistoj kaj ŝajne negroj, diabloj, kiuj hejtas la ŝajrejojn de la maŝinoj. Ankaŭ la ŝipestro montris al niaj amikoj senfadenan telegrafan stacion kaj bone provizilan malsanulejon.

Ĉiuj kunvenas en la kajuto de la ŝipestro, kiu malŝtopas botelojn da jereza vino. Dum ili trinkas, la kapitano kuraĝigas la vizitantojn fari

PRI LA BILDO.—Ili sidas ĉe tablo, kaj gustuminte la ardan vinon, ili forlasis la tedantan seriozecon kaj elvidiĝas fluparolemaj. La italo, s-ro. Talarinni, enfaze diras :



—Ho!, miaj karaj sinjoroj; en Italio ni havis gloran pentriston, kiu, iun inspiritan tagon, en restoracio, pentris makaroniojn en telero tiel perfekte, ke oni povis manĝi ilin.

marekskurson, por ke ili profitu la okazon, ĉar la ŝipo post du tagoj albridiĝos al proksima haveno, de kie per vagonaro, ili revenos tuj.— Ili akceptas kaj dankas la ŝipestron.

DEKTRIA TEMO.—Marekskurso

Je la oka matene niaj konatoj enŝipiĝas kaj la ŝipestro akceptas ilin gasteme, kaj montras al ili iliajn kajutojn. Kvaronon antaŭ la naŭa la ankroleviloj funkcias kaj malmulte da tempo poste ekfunkcias la helicoj, ili atencas la kvietecon de la akvo, kiu, kiel kolerigate, ĵetas, verŝas en la ŝipon sian blankan ŝaŭmon kvazaŭ ĝi estu ofendo; ŝajnas ke la maro kraĉas.—Oni aŭdas la bruon de la ankromaŝinleviloj.—La ŝipo tremas, tremegas, kaj turniĝas ĉar la piloto celas, manovrante

PRI LA BILDO.—Estas nun la germano, Von Pilsan, kiu profunde, seriozege diras :

—Ha !, sinjoroj ; en Prusio estis kolosa pentristo, Van Dick, kiu



tiamaniere pentris sur muro pendigilojn, ke ĉiuj iris al ili por pendigi la ĉurtutojn kaj ĉapelojn, kaj ĉi tiuj falis planken—, kaj la bonhumora germano ekridegas dum la hispano ridetas kaj la italo miras.

la timonon, direkti la ŝipantaŭon al la eniro de la haveno, kaj ĉiam li tion atingas, la ŝipo antaŭeniras, la ŝipantaŭo majeste fendas la maron kaj la helicoj lasas post la ŝipo blankan ŝaŭmon vojon, ŝipiran postsignon.—Bela estas la marveturo dum la tago ĉar la ŝipo apenaŭ balanciĝas kaj tial oni ne riskas suferi marmalsanon. Agrable oni pasigas la tempon kaj, iom malfrue, marvojaĝantoj enlitiĝas: nur maldormas la maristoj, kiuj viglas atente kaj direktas la ŝipon.

Frumatene, je la tagiĝo, la ŝipestro surprizas niajn ĥonatojn starantaj sur la ferdeko por rigardi la aperon de la reĝa astro kaj ĝui la belan impreson de la naskiĝanta fajra disko en la horizonto.

Ĉiuj matenmanĝas; la ŝipvivo komenciĝas. Feliĉe la tempo pasas. En la horizonto, kontraŭ ni, aperas nigra nubeto, kiu rapide pligrandiĝas kaj venas en la ŝipon. La subpiloto, maljuna sed sperta marlupo, kiu staras apud la ŝipestro, grumbblas dum li studas la nubojn, kiuj

PRI LA BILDO.—La andaluziido, rigardante malice la amikojn, dum la germano ridadas kaj la italo sulkigas la frunton kaj fumas, ridetante diras :



—Nenio dirita de vi estas rimarkinda, grava. Atentu, sinjoroj : en Sevilo estis pentristo, Murillo, kiu, iam promenante sur bordo de la rivero Gvadalkiviro, trovis korkŝtopilon por botelo ; li prenis ĝin, pentris ĝin imitante marmoron, kaj ĵetis ĝin en la riveron, kaj la korkaĵo iris en la fundon tuj.

etendiĝas sub la blua ĉielarkaĵo, kaj li murmuris al la ŝipestro : «ni havos dancon». Efektive, post ne longa tempo, fortega vento ekmoviĝas, ĝi agitas la antaŭe trankvilan supraĵon de la maro, kaj frapas la ŝipojn, kiu komencas balanciĝi terure. La ventego siblas ; la mastoj krakas ; altegaj ondoj atakas la ŝipon, kiu brave disigas ilin. Mirinda kaj grandioza kvankam terura spektaklo!

Subite sonas fajfalo, kaj oni aŭdas la potencon voĉon de la ŝipestro, kiu ordonas de la ponto. La maristoj kuras ĉien, kaj kelkaj el ili kun oficiroj preparas vaporŝalupon kaj boatojn, delasas ilin en la furiozan supraĵon kaj enŝipiĝas. Kio okazas ? Ĉu estas danĝero ? Ĉiuj demandas ; ĉiuj ekkras. La ŝipo ŝanĝas la direkton laŭ la ordonoj de la ŝipestro. Fine, oni divenas la okazantaĵon : alia ŝipo estas en grava danĝero, ĝi ekdronas, ĝia ŝipanaro riskas perei, droni. Jam oni vidas la malbonsortan

«LASTA DECIDO», de Bagaria (el la nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Ekmortanto vokas familianon kaj diras al ĉi tiu :



—Atentu kaj plenumu; diru tuj al Petro kaj al Johano, ke ili venu rapidege al mi ĉar mi tuj mortos kaj antaŭ ol okazi tiel, mi deziras vidi ilin.

ŝipon, ĝi estas velŝipo, sed ĉu fregato, korveto aŭ jaĥto? Malfacile estas rekonii tion, ĉar la ciklono eligis el ĝi la mastojn.

La saŭboatoj kuraĝe antaŭeniras al la malbonsorta velŝipo; oni vidas ili supreniri kaj malsupreniri akvomontojn kaj fali en abismojn, aperi kaj malaperi. Ili alvenas al la pereanta ŝipo, kaj oni rigardas, ke maristo de ĝi, preskaŭ nuda, sin ĵetas en la maron kaj naĝas pene tenante ion. Savonto trafas lin per ŝnuro, kiun kaptas la naĝanto, kiu saltas portante kablون sur la vaporŝalupon. Oni ligas la kablون kaj per ĝi glitas la malfeliĉaj ŝipanoj, kiuj enŝipiĝas en la saŭboatojn. Sed la danĝero ankoraŭ ne finiĝis, ili devas veni en la ŝipon. Kian grandan ofere mon postulas la marvivo!

Feliĉe, jen sur la ferdeko savintoj kaj savitoj. La vojaĝantaro gra-

PRI LA BILDO.—Familiano rapide iris de domo en domon, komunikante la deziron de la ekmortanto, kaj jen Petro, la prunedonisto, tre kontenta sciinte la alvokon, pro kio li diras al si mem :



—Mi prave opiniis, ke li volas morti kiel bona kristano, pagante antaŭe al mi la ŝuldon.

tulas la savintojn kaj premias iliajn klopodojn kaj penojn per huraoj kaj aplaŭdoj, kaj zorgas la savitojn ameme.

La uragano daŭras kaj daŭrigas la malbonan kaj danĝeran staton de la maro, sed spite de ĉio, la vaporŝipo sin defendas brave kaj ĝi jetas ankrojn en la haveno, kiu estas limo de la vojaĝo de niaj ŝonatoj, kie ili elŝipiĝas, same kiel la ŝipanaro de la fundirinta velŝipo. Niaj ŝonatoj dankas kaj adiaŭas la ŝipestron.

DEKKVARA TEMO.—La familio

Mi ŝonas riĉan familion simpatian, kiu estas multenombra kaj kiu loĝas en eleganta domo de centra strato en nia ĉefurbo.—La familio konsistas el gepatroj, du filoj kaj tri filinoj, sed ankaŭ loĝas kun ili la patrino de la edzino kaj frato de la edzo, kiu estas fraŭlo.—La

PRI LA BILDO.—Johano, ankaŭ avara pruntedonisto sin vidigas plenkaj kaj dirante al si mem la samon, ĵus ricevinte la avizon, akcelante la iron al hejmo de la ekmortanto.



edzo multe amas sian bopatrinojn, kaj la edzino sian bofraton. La avino amas pli la nepojn, ol la nepinojn; la onklo, kontraŭe, pli la nevinojn, ol la nevojn.—La feliĉo regas ĉi tiun familion.—La malplejaĝa el la gefiloj estas junulo deksepjara.—La junuloj estas nomataj Johano kaj Petro, la junulinoj Mario, Jozefino kaj Ludovikino.—Ili estas simpatiaj, gajaj kaj kleraj geknaboj.—Jozefino, bela kaj gracia, estas fianĉino de najbaro, kiu estas inĝeniero.—La kvin gefratoj dorlotas la avinojn kaj la onklojn.—La edzo havas alian fraton, kiu estas vidvo kaj havas du ŝercemajn filinojn, tiel belaj kiel siaj kuzinoj.—Ĉi tiu familio akceptas ĉiŝaŭde vespere parencojn kaj amikojn.—Ĉi tiu tago, ĉiusemajne, la parencoj kaj amikoj rendevuas en ĉi tiu domo, kie oni koncertas, dancas kaj pasigas agrable la tempon.—Vere okazas ĉiusemajne amuza kunveno, kaj la gemastroj invitas ĉiam la ĉeestantaron trinki teon.—Dum la junuloj flirtas la junulinojn, ili petolas kaj ĝentile kaj korekte distras unu la alian; la seriozaj personoj ĉu parolas pri literaturo, ĉu pri okazintaĵoj, ĉu komentarias nunan politikon, aŭ ludas kartojn.

PRI LA BILDO.—Kiam la ekmortanto vidas ilin ĉe sia alkovo kun vizaĝoj maskitaj de doloro, li diras :

—Bonvolu sidiĝi ĉiu ĉe unu el la flankoj de la lito, ĉar mi tute certe mortos tuj.

—Ne, tiel ne okazos, Jozefo ; vi ne mortos. Kial vi vin ĝenis



vokinte nin por pagi al ni?—diris ambaŭ kvazaŭ ili antaŭe estus interkonsentintaj la diron.

—Ne, ne ; vi eraras... Mi ne ĝe... nis... min ; mi... vo... kis... vin..., ĉar... mi... vo... las... mor... ti, kiel... mortis... Jesuo..., inter... du... ra... bistoĝ !...

DEKKVINA TEMO.—La homa korpo

La homa korpo konsistas el kapo, trunko, brakoj kaj kruroj.

En la kapo estas la kranio kaj vizaĝo. La kranio enfermas la cerbon, kaj cerbeton. La supra kaj posta parto de la kapo estas kovrita de haroj.

En la vizaĝo estas frunto, tempioj, brovoj, okuloj (kun siaj pupiloj, okulharoj, kaj palpebroj), vangoj, nazo, buŝo (interne en la buŝo estas lango, palato kaj dentaro—dentoj, ŝirdentoj, mueldentoj—troviĝantaj

KIU ESTAS SANCHA?

Sancha estas alia hispana genia karikaturisto, famiĝinte ekster Hispanio, kiu tre bone desegnas, donante vivon kaj animon al siaj geniaj spritaj historietoj.

«**BONEGA URBESTRO**» (el nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Vidu vilaĝon, post kiu, sur altano, staras ruinoj de mezepoka kastelo, kaj dekstren tre antikva triumfa arkajo.



Rimarku en la fasadoj de du domoj grandaj tipaj kradoj. Unuavice vidu la urbestron alparolanta al gevilaĝanoj; li admonas kaj konsilas la gevilaĝanojn, ĉar li estas tre severa kaŭze de la oftaj raboj, pro kio li monpunas ĉiujn, kiam okazas rabo.

en la makzeloj), lipoj, oreloj kaj mentono. La viroj havas lipharojn, vangharojn kaj barbon. La haŭto, kiu kovras la vizaĝon havas sulkojn kiam la personoj estas maljunaj, kaj multaj el ĉi tiuj posedas specialan karakteron, specialajn diferencojn, proprajn diferencojn, en la vizaĝo.

PRI LA BILDO.—Vidu angulon de la vilaĝo, laste la remparon kaj turojn de la malnova kastelo. En la strato, kelkaj vilaĝanoj, indignite, komentarias la decidojn de la urbestro, kiu estas malsaĝa kaj maljusta kaj netolerebla. Ĉiuj plendas same: ĉiuj juĝas



la urbestron inda je atenco sed nur por spertigi lin pri lia malsaĝeco kaj maljusteco. Unu el la vilaĝanoj oratore sin turnas al ceteraj dirante:

—Ne plu ni toleru tiom da malsaĝaĵoj; ĉi tiun nokton mem, ni rabu al li la kokinaron,—kaj ĉiuj konsentas fari tiel.

kujn oni nomas trajtoj kaj kiam persono movas intence la vizaĝon, oni nomas tiujn movojn gestoj aŭ grimacoj, kiujn oni uzas ankaŭ por moki aŭ ofendi iun, aŭ por ridigi iun.

En la trunko oni trovas la kolan kun ĝia gorĝo kaj nuko, ŝultrojn, brustojn, mamojn, ventron, umbilikon, dorson, koksojn, talion, ingvenojn, akselojn, gluteojn.

Oni povas diri, ke la trunko estas ujo kies trabaĵo estas formata de la spino (konsistanta el vertebroj), ripoj, klavikloj, sternumo kaj pelvo; trabaĵo kovrata de muskoloj, kaj supraĵe de la haŭto. Ĉi tiu ujo enhavas ezofagon, koron, pulmojn, renojn, hepaton, kiu sekrecias la

PRI LA BILDO.—Jen almetita sur la muro manŝtuparo kaj sur la ŝtuparo vilaĝanoj efektigante la planitan rabon, kun la ĉeesto



de la luno, kiu lumigas ilin. La vilaĝanoj eniras la korton de la urbestro kaj al ĉi tiu rabas la kokinaron.

galon, lienon, pankreazon kiu sekrecias sukon, kiu estas efika por la digesto, stomakon, intestojn kaj seksajn organojn.

La koro estas la homa motoro, kies motora forto estas la sango, kiu estas arteria kaj vejna, tre ruĝa la unua, kaj malhele blua la dua. La arterioj estas kondukiloj, tuboj tra kiuj la sango iras de la koro en ĉiujn korpajn regionojn; kaj la vejnoj ankaŭ estas tuboj, tra kiuj la sango revenas en la koron de la lokoj kie la arterioj finiĝas.

La centra parto de la nerva-cerba-spina sistemo konsistas el cerbo, cerbeto kaj bulba-mjelo aŭ encefala kolo, enhavataj en la krania kavaĵo, kaj el la mjelo enhavata en la vertebra kolono.

La brako konsistas el humero, ulno kaj radio, manradiko, mano, karpeo kaj fingroj. Ne forgesu la kubuton kaj ungojn.

En la kruro estas femuro, gluteo, patelo, genuo, tibikarno, peroneo, tibio, piedo, tarso, maleoloj, kalkano, plando, fingroj kaj ungoj.

Ĉiuj ostoj formas la skeleton.

PRI LA BILDO.—Rabinte la kokinaron, la vilaĝanoj forkuras disiĝante; kontente ĉiu portas sian rabitaĵon.



DEKSESA TEMO.—Nutraĵoj

La homo manĝas diversajn nutraĵojn, sed la pled konvenaj estas la vegetaraj kvankam oni multe estimas viandon kaj produktaĵojn de diversaj bestoj.

Fluidaj nutraĵoj: Akvo, lakto, buljono, siropo, ĉokolado, teo, kafeo, oleo, suko el diversaj fruktoj, punĉo kaj kelkaj infuzaĵoj. La vino, brando, likvoro, ĝino, konjako kaj ankaŭ la biero estas danĝeraj, kvankam estas multaj personoj, kiuj opinias kontraŭe kaj trinkas tiujn trinkaĵojn. Terura alkoholismo! Vojo al multaj malsanoj!

Vegetaraj nutraĵoj: Cerealoj, legomoj, radikoj kaj tuberoj.
Hortikulturaj herboj.
Fruktoj.

Cerealoj (tiel estas nomataj ĉar oni oferis ilin al Diino Ceres) estas gramineaj plantoj el kiuj oni povas fabriki panon, kiu estas la ĉefa fundamento de la homa nutrado en multaj landoj. Ili estas tritiko, aveno, hordeo kaj sekalo, plie, oni konsideras duaj cerealoj aliajn

PRI LA BILDO.—La urbestro, frumatene, eniras en la korton kaj li rimarkas, ke nur en angulo staras la koko kun skribita



kartono, kiu pendas de ĝia kolo kaj diras: «De la unua matene mi estas tute sola.»

gramineajn plantojn, el kiuj oni utiligas nur la rizon kaj maizon. La greno enhavas glutenon, albumenon, sukeron, magnezion, iujn salojn, kalkan fosfaton, k. c.

Oni muelas ĉi tiun grenon kaj rezultas du pulvoraj specoj: faruno kaj brano. El tritika kaj sekala faruno, oni fabrikas panon, kaj ankaŭ el maiza faruno oni fabrikas bongustan flavan panon en iuj regionoj. La aveno kaj hordeo taŭgas por nutri la bestojn, kaj de antaŭ nelonge iliaj pistitaj grajnoj, kuiritaj kun akvo, lakto aŭ buljono, estas bona nutraĵo por la homo. Per fermentado de la hordeo kaj el maldolĉaj floroj de la lupolo, oni fabrikas bieron. El riza faruno oni ne povas fabrikii panon tial ke ĝi ne enhavas sufiĉan kvanton da gluteno, sed ĝia grajno estas unu el la plej ĉefaj nutraĵoj, super ĉio, por la ĥinoj kaj japanoj. En Valencio kaj Katalunlando, oni kulturigas multe la rizon.

El tritika kaj sekala faruno ankaŭ oni fabrikas pasteĉojn, kukojn, biskvitojn kaj supo-pastojn, tiaj estas makaronioj kaj vermiĉeloj.

«**MAŬROJ KAJ KRISTANOJ**», de Sancha (el la nokta ĵurnalo «Luz», de Madrido).

PRI LA BILDO.—En maroka tendaro dum milito staras kaj sidas soldatoj. Sur ilin oni vidas kapotojn, kartoĉujojn, rimenaron, sed



ne troviĝas. Unu el ili ŝirmas siajn piedojn per maŭraj belvidaj pantofloj, kiuj mirigas la aliajn, pro kio unu el ili diras:

—Ho, bonŝanculo! Kie vi trovis tiujn maŭrajn pantoflojn?

Legomoj estas herbaj plantoj de la legumenoza familio, kies grajnoj oni utiligas ĉiel nutraĵojn.

La grajnoj de tiuj legomoj enhavas legumemon anstataŭ glutenon, sed la legumeno estas pli riĉa je nitrogeno, ol la gluteno de la cerealoj kaj je plej granda proporcio, ankaŭ ceterajn substancojn de tiuj gromineaj.

La legomoj, kiuj taŭgas por la homa nutrado, estas speciale lento, fazeolo, fabo, pizo kaj kikero (garbanzo). Nur oni kulturas la lastan en Hispanujo, Italujo kaj Meksikio.

La plantoj de radiko kaj tubero manĝeblaj, kvankam malpli nutraj, ol la antaŭaj, estas nutraĵoj pli malkaraj, kaj taŭgas por tre gravaj industrioj, kiuj elĉerpas el ili farunon, sukeron, kaj alkoholojn per ilia fermentado.

PRI LA BILDO.—La samaj soldatoj en la sama loko kaj la bonŝanculo klarigas la eltrovon laŭ jene:



—Mi eliris el la tendaro kaj, enirinte en la malamikan kam-
paron, mi renkontis maŭron kaj mi mortigis lin, depreninte poste de
liaj piedoj la pantoflojn.

La plantoj de karna radiko prezentas tre strangan disvolvon kiu sin rimarkigas de la nutra periodo de la planto en tiun de la reproduktado: la unua periodo finiĝas per dikigiĝo de la radiko, dikigiĝo, kiu komenciĝas apenaŭ la folioj atingas sufiĉan kreskadon. Pro la dikigiĝo de la karna radiko, ĉi tiu estas vera tenejo enhavanta albumenon kaj sukron, el kiuj sin nutras la branĉetoj, floroj kaj fruktoj dum la dua periodo. La rapo, beto karoto kaj napo estas ĉefaj, kaj super ĉio la beto.

En la tuberaĵ plantoj okazas same kiel en la antaŭaj: unue efektiviĝas folia kreskado, kaj kiam la foliaro atingas grandan kreskadon, ekkreskas la tuberoj, kies kreskado finiĝas kiam la planto fruktiĝas kaj mortas. La terpomo kaj la dolĉa terpomo (batato laŭ vortaro Verax) estas la ĉefaj. El la terpomo oni elĉerpas farunon kaj alkoholon; oni konfitas la dolĉan terpomon.

La beto estas la planto, kiu, brom la sukerkano, enhavas plej multe sukron.

PRI LA BILDO.—Unu el la aŭskultintoj, kiu estas andaluziido, aperas saltante la defendantan pikildratreton de la tendaro, dirante :



—Nu; adiaŭ! Nun mem mi deiras por serĉi kaj havigi al mi pantoflojn.

Hortikulturaj herboj: Kukurbacoj, solanacoj kaj liliacoj. La du unuaj donas manĝeblajn fruktojn; kaj la lastaj, manĝeblajn bulbojn. Al la unuaj apartenas melono, kiu devenas de Persujo, kies ĥarna frukto estas tre bonodora kaj dolĉa; la akvomelono, la kukumo kaj la kukurbo; al duaĵ, la tomato kaj la pimento; al triaĵ, bulboj kaj ajloj.

Sed hortikulturaj herboj propre, kies foliojn, trunketojn kaj branĉetojn oni uzas aŭ utiligas kiel nutraĵojn, ĉu ĥiritajn, ĉu ĥrudajn (salaton), estas, inter aliaj, diversaj specoj de brasikoj, kaj florbrasiko, profitante la foliojn de la anuaj kaj florajn abortitajn organojn de la dua; spinaco, laktoĥuko, dolĉa cikorio (ĉar la maldoĉa estas surrogato de la ĥafo), celerio, artiĥoko, ĥardo, kaj asparago estas la ĉefaj.

Ankaŭ oni utiligas la fungojn.

Fruktoj: Banano, daktilo, oranĝo, citrono, granato, figo, vinbero, migdalo, avelo, nukĥo, abriĥoto, ĉerizo, pruno, persiĥo, piro, pomo,

PRI LA BILDO.—Unu el la partoprenintoj la scenojn antaŭajn sidas, kaj la bonŝanculo sin turnas al la sidanto, tiel sin esprimante :



—La tempo tro forpasis de kiam la andaluziido foriris; ĉu eble la maŭroj kaptis lin?...

ribo, frago, frambo, cidonio kaj aliaj multaj taŭgas kiel nutraĵoj. Ekzistas industrioj, kiuj eksportas ilin sekaj aŭ kun siropoj, marmeladoj, en potetoj aŭ ladaĵoj skatoloj, ofte eliginte antaŭe el ili la kernojn kaj ŝelojn. El iuj el ili oni fabrikas alkoholajn trinkaĵojn, kiun multe ŝatas multaj personoj; kaj speciale, el vinbero, vinojn de Jerez, Malaga, Porto, Madera, Campano, Rejno, k. c., kaj tial oni fondas novajn industriojn, kaj iuj el ĉi tiuj fondas aliajn pro la distilado de alkoholoj, likvoroj, konjakoĵ kaj brandoj. Fine el la vino oni fabrikas la vinagron.

El olivo oni elĉerpas oleon, per kiu en multaj landoj oni anstataŭas la buteron por la preparado de la kuiritaĵoj. La oleo ankaŭ taŭgas por grasoŝmiri la maŝinojn kaj por la lumigado. Ankaŭ oni elĉerpas oleon el maldolĉa migdalo, papavo, nukso, linsemo, kanabsemo, kokoso, k. c. Ĉi tiujn oleojn oni uzas kiel kuracilojn, kaj por pentri kaj lubrifiki. La plej bonajn oleojn el olivo oni fabrikas en Hispanujo (Tortosa, Katalunlando kaj Andaluzio) kaj en Italujo.

La homo ankaŭ manĝas la viandon de bovo, porko, ĉevalo, azeno,

PRI LA BILDO.—Sed jen li revenante fiere kun aroganta sintenado, fumante cigaredon, kun la botoj pendantaj de sur la dorso supren la tornistro, piedvestite de maŭraj pantofloj. Unu el la atendintoj diras :



—Kial vi estis for tiel longedaŭre? Ĉu okazis al vi io?

—La kialo estas evidenta kaj konvikanta, ĉar mi ne trovis dum multe da tempo pantoflojn ĝustmezurajn por miaj piedoj, mi estis devigata mortigadi maŭrojn ĝis kiam mi trovis al konvenajn pantoflojn—, li tiel konfuzigis la fanfaronulon de la maŭraj pantofloj.

hundo, urso, cervo, kuniklo, kapro, leporo, apro kaj aliaj mambestoj; viandon de koko, kolombo, ansero, meleagro, perdriko, koturno, fazano, k. c. Ankaŭ li utiligas la ovojn; viandon de granda nombro da fiŝoj, sardino, merlango, gado, salmo, truto, anguilo, k. c.; viandon de multaj moluskoj, ostro, kankro, heliko, mitulo, k. c.

El tiuj viandoj oni fabrikas konservaĵojn, kiujn oni enfermas en ladaĵoj por la eksportado, fondante gravajn industriojn. Ankaŭ oni pekilas kaj sekigas la gadon kaj ĝin eksportas ĉien, ĉar ĝi estas bona, koncvena kaj malkara manĝaĵo. El la hepato de la gado oni elĉerpas fluidaĵon, gadan oleon, kiu estas kuracilo tre konata kaj rekomendinda.

KIU ESTAS MARTINEZ DE LEON?

Martínez de León estas mirinda karikaturisto tre sprita kaj genia por vidigi tipajn andaluziajn scenojn per vivoplena liniaro, per realegaj siluetoj.

«**MALSANA CIGANO**», de Martínez de León (el la ĵurnalo «El Sol», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Ciganino sidas apogante sian mentonon



sur siaj manoj. Oni vidas en la ĉambro alian seĝon, kaj post la sidanta ciganino pordon de alkovo kun kurteno iom refaldita kaj permesanta tiel vidi liton. La ciganino ploras senkonsole, senespere, pro malsano de sia edzo.

La lakto de multaj mambestoj ankaŭ estas tre bona nutraĵo, kaj el bovina, ŝafina kaj kaprina lakto oni fabrikas multajn specojn de fromaĝoj, kaj el bovina lakto oni faras buteron. La lakto de kamelino estas savo de multaj karavanoj tra la dezertoj, kaj la ĉevalina lakto fermentita estas unu el ĉefaj nutraĵoj de la kaŭkaza regiono, kaj oni opinias serioze kaj fundamente, ke ĝi forigas la ĥoleron, kaj ke la loĝantoj el tiu regiono dankas sian longedaŭran vivon al tiu nutraĵo.

La homo ankaŭ utiligas la mielon de abeloj kaj vespoj kiel nutraĵon.

PRI LA BILDO.—En la ĉambro staras la ciganino kaj du intimaj amikoj de la malsana cigano; ambaŭ amikoj de la cigano estas de la sama gento, de la sama raso. Unu el la alvenintoj de-



mandas pri la sanstato de la malsanulo, kaj la ciganino diras pri la malbonfarto:


—Ve, Antono! Li estas en grava danĝero! Li jam konas ne-
niun!

DEKSEPA TEMO.—Bestoj

La homo sukcesis regi ĉiujn bestojn eĉ la plej sovaĝajn. Estas iuj personoj, kiuj mirigas amasojn per siaj ludoj kun leonoj, tigroj, rampaĵoj kaj aliaj teruraj bestoj, aŭ per simioj, kiujn ili sukcesas dresi.

*Al kvarmanuloj apartenas la simioj, kies ĉefaj familioj estas: Oran-
gutano, vorto signifanta sovaĝan homon, kiu loĝas precipe en Java,
Malaka kaj Borneo; Gorilo, de granda staturto, loĝanta, ĉiel la ĉim-
panco (Konga kaj Ginea vorto), en la intertropika Afriko; malgrandaj
simioj, loĝantoj de la Gibraltara ŝtonego; titisoj, malgrandaj kaj tre
inteligentaj, familio malmultenombra loĝanta en Ameriko; lemuroj, kies*

PRI LA BILDO.—La demandintoj eniris en la alkovon kun la ciganino kaj starante flanken de la lito de la malsanulo, ĉiu siavice demanads sammaniere al la malsanulo :



—Kiu mi estas amiko? Ĉu vi konas min?

—Ĉu vi konas min?


buŝego estas tre akra, kun lanaj haroj kaj tre longaj kruroj, kiuj permesas al ili salti multe kaj facile, kiuj loĝas en Madagaskar, Afriko kaj Molukaj insuloj, kaj tial ke ĉi tiuj simioj posedas tre subtilan flaron, oni utiligas ilin por ĉasi, ankaŭ ili estas noktaj aŭ preskaŭnoktaj. Iuj kvarmanuloj havas voston kapablan preni kaj premi.

Vesperto, hundo, kato, hieno, ermeno, mustelo, lutro, urso, lupo, leono, tigo, linko, leopardo kaj foko (marlupo kaj marleono, kiuj eliras teren propravole kaj kiam iliaj idoj mamsuĉas) estas diversaj familioj apartenantaj al la karnomangantoj.

Sciuro, rato, muso, kastoro, leporo, kuniklo kaj aliaj estas familioj de la mordetanta ordo (mordetuloj).

Elefanto, mamuto (simila je la elefanto, kiu vivis dum la komenco de la kvarternara epoko, kies fosiliajn ostojn oni trovis en la jaro 1790^a

PRI LA BILDO.—La ciganoj jam foriris kaj la ciganino estas ĉe la piedo de la lito, kaj la malsanulo trunkstariĝas sur la lito demandante al la edzino:



—Mario, diru al mi la veron, je via sano! Ĉu estas nun kar-
navalo?

en Siberia marbordo kaŝita de glaciejoj, kaj ĉiam tiuj glaciejoj fand-
iĝis, oni trovis ĝian korpegon, kies haŭto estis kovrita de longaj kaj
nigraj haroj laŭlonge la dorso, kaj de abunda ruĝa lano sur la ceteraj
korpopartoj), mastodono (kies grandegan ŝkeleton ni nur konas), hipo-
potamo aŭ riverĉevalo, rinocero, porko, ĉevalo, azeno kaj zebro estas
familioj de la pakidermoj. La mulo, nereproduktiva besto, naskita pro
kumpariĝo de ĉevalino kun azeno, ankaŭ estas pakidermo.

Oni malkaŝis antaŭ nelonge en Tendaguru (Okcidenta Afriko)
ŝkeleton de grandega besto, kaj oni nomis ĝin Afrika Gigantosaŭro,
kiun oni konservas en Sout Kensington Muzeo, kaj ĉiun donacis la
riĉulo Carnegie. Gigantosaŭro Afrika certe vivis dum la epoko de la
mamuto, mastodono k. c. grandaj bestoj, kaj ĝi devas aparteni al la
pakidermoj. Oni opinias ke ĝiaj emoj estis la samaj kiaj tiaj de la
hipopotamo. Ĝiaj ampleksoj estas 48 metrojn de la kapo ĝis la ekstremo
de la vosto, kaj 6 metrojn 60 centimetrojn ĝia staturato.

«**LA BOPATRINO**», de Martínez de León (el la ĵurnalo «El Sol», de Madrido).

PRI LA BILDO.—Antono, kurante rapide, saltante, mal-supreniras la ŝtuparon, kapnude kuras, timigante hundon.



Sendentuloj konsistas el tri familioj. Al la unua apartenas la bradipo aŭ tridaktilo, kiu sin nutras el folioj kaj loĝas en Suda Ameriko; al la dua apartenas la dazipo, kies dorso estas kovrita de skvam-oza speciala kovrilo (karapaco laŭ vortaro *Verax*); la mirmekofago, kies buŝego estas tre longa kaj akra kun fadenforma lango kovrita de tre glueca salivo, kun la dorso kovrita de haroj, armita per fortaj ungoj por fosi la teron kaj serĉi formikejojn ĉar ĝi sin nutras per formikoj, ĝi ankaŭ estas loĝanto de Suda Ameriko; la maniso, kies korpo estas kovrita de skvamoj tegole aranĝitaj, kiujn formas la haroj lutitaj; la megatero, kies solan fosilian skeleton, ĥiun oni trovis en la apudajoj de la rivero Lujan ĉe Buenos Aires, oni konservas en la Madrida Muzeo pri Natura Historio, kaj ĝi apartenas al la kvaternara epoko: la tria familio estas tiu de la monotremoj, stranga familio karakterizata de kloako al kiu alfluas la dika intesto kaj urina konduko, kun ungoj en la kruroj, kaj la virbestoj havas en la postaj kruroj kavajn spronegojn per kiuj ili eligas fluidaĵon kiu devenas de glando troviĝanta en la femuro kaj pri kiu oni opinias, esti venena; ornitorinkoj kaj ekidnoj loĝas en Nova-Holando.

Marsupialoj estas strangaj bestoj, kies idoj ne atingas en la utero

PRI LA BILDO.—Kaj ekscitite, kvazaŭ startante, li daŭrigas la kuradon tra la strato.




la kreskadon, sed en speciala saĝo, kiun havas la patrinoj sur la ventro kaj kiu enfermas la mamojn. Oni citas la makropon, la kanguruon kaj la didelfon. Ĉi tiu lasta havas la piedojn kiel estas tiuj de la simioj, kaj ankaŭ premantan voston, kaj loĝas en Ameriko. La kangurulo loĝas en Nova-Holando kaj apudaj insuloj.

La kamelo, dromedaro, lamo, vikuno, mosko (kiu sekrecias tre bonodoran substancon, el kiu oni preparas parfumon), norda cervo, ĥapreolo, antilopo, ĉamo, ĝirafo, ĥapro, ŝafo kaj bovo, apartenas al la remaĉantaj bestoj, kiuj multe helpas la homojn.

La baleno, marbovino, makrocefalo kaj delfeno, kiuj loĝas en la maro, apartenas al la ĥetacoj, mamuloj kiuj ŝajnas esti fiŝoj.

La birdoj estas terloĝantaj kaj akvoloĝantaj. Inter la unuaj estas la vulturoj, inter ili la kondoro, kiu loĝas en Ameriko; la ĥatarlo, kiun adonis la antikvaj egiptoj, la ĝipateo, la falko, besto tre forta kaj facilmoza, kiu flugas rapide kaj tre alte, kies vido estas tre akra, al kiu apartenas la falko porpre dirite, kiun oni utiligis por la ĉaso, la aglo, la akcipitro, la nizo, kaj la milvo, kaj iam oni opiniis aparteni al ĉi tiu grupo la serpentario, kies ĥuroj estas tre longaj, kaj kiu sin nutras el kolubroj eĉ venenaj; la strigo, la najtingalo, la hirundo (ekzistas en Azio, Ĥinuĵo, speciala hirundo, kiu konstruas sian neston el manĝeblaj algoj, kaj oni multe ŝatas tiujn nestojn kiel manĝaĵon), la

PRI LA BILDO.—Kurante, li estas renkontata de amiko, kiu, mirante, sin turnas al la kuranto, ĉi tiun haltigante:



—Kio okazas al vi, Antonio?

—Nenio! Ne haltigu min, mi petas vin je la nomo de via plej amata persono, ke vi ne haltigu min!

kanario, la kolibro, la pasero, la papago, la kokoj, la kolomboj (oni utiligas el ĉi tiuj specialajn kolombojn, por transporti skribaĵojn, telegramojn), la perdriko, la koturno, la oriole, k. c. El la duaj oni devas citi la ciklonion, fenikopteron kun rozkoloraj kaj ruĝaj plumoj, la struton (kiu loĝas en Afriko kaj metas en la sablon siajn ovojn, kiujn la varmeco de la suno kovas, kaj kies plumoj estas tre kara ornamo de la virinaj ĉapeloj), la otison, la karadron, la grupon, la ardeon, la ibison (kies religian specon adoris fervore la egiptidoj), la skolonon, la ralon, la fulikon (kiuj loĝas en la marbordoj, riverbordoj kaj marbordoj), la podicepson, la aptenoditon, la mevon, la marhirundon, la rinkopson, la pelikanon (ĉi tiu havas sakon, kiu pendas de la du branĉoj de ĝia malsupra makzelo, en tiun sakon la pelikano metas kaptitajn fiŝojn por mcligi ilin, kaj ĝiam ĝi devas nutri siajn idojn, tiam ĝi premas la sakon kontraŭ sia brusto mem, kaj tial eliras el la saĝo la nutraĵo, per kiu sin nutras la idoj. Pro tio oni faris legendon pri patra

PRI LA BILDO.—La du amikoj dialogas, demandante de-
nove la haltiginto :



—Sed, ĉu al vi okazis granda malfeliĉo?

—Ne, mia bopatrino gustumadis kaj englutis laktoglaciaĵon, kaj
ŝi fulme grave malsaniĝis!

amo, ke la pelikano vundas sian bruston por nutri sian idaron, ĉar oni
opiniis, ke li nutras ĝin per sia sango), la anseron, la cignon, la anason
kaj la nigran cignon de Nova-Holando.

La testudo, la krokodilo (krokodilo ĝuste dirite, estas tiu kiu loĝas
en Afriko; gavialo, tiu kiu loĝas en Hindujo; kajmano aŭ aligatoro, tiu
kiu loĝas en Ameriko). La krokodilo havas tre malgrandan sed teruran
malamikon, kiu suferigas ĝin multe eĉ ĝin mortigas; tiu malamiko estas
speciala formiko, kiu eniras en la buŝon de la krokodilo, sin lokumas
en ĝia lango, kiam ĝi ulcerigas per konstanta pikado; sed feliĉe por la
krokodilo, alia malgranda besto, birdeto, savas ĝin. La krokodilo,
vidante flugi sian amikon, malfermas la buŝon, la birdeto eniras en la
buŝan kavaĵon de la krokodilo kaj purigas per sia beko la krokodilan
langon manĝante la formikojn. Nur kiam la birdeto estas forfluginta,
la krokodilo fermas ia buŝon. Lacerto, ĥameleono (kiu memvole

PRI LA BILDO.—Antono, tion dirinte, ekkuras denove, dum la amiko demandas :



Martino de la

—Ĉu vi iras voki la kuraciston? Kiun kuraciston vi vokos?

Antono turnante la kapon, diras :

—Neniun! Mi kuras por alporti al ŝi alian laktoglaciaĵon!

ŝanĝas la koloron de sia haŭto), plesiosaŭro (stranga besto, kies fosilian ŝkeleton oni trovis en iuj anglaj kaj germanaj lokoj), serpentoj, kolubroj, vipero, apartenas al la reptilioj aŭ rampaĵoj, bufo kaj rano estas batrakoj.

Multego da bestoj apartenas al ĉvara klaso de la vertebruloj, al la fiŝoj: gado, ŝarko, angilo, sardino, merlango, salmo, tonfiŝo, truto, skvalo, k. c., k. c.

Apartenas al la moluskoj, klaso de bestoj kies korpo ne havas ŝkeleton, kies korpo estas mola kaj ofte enfermata en konko, la ostro, mitulo, heliko, limako, k. c.

La insektoj estas bestoj provizataj je speciala ŝelo pli malpli mola, kies korpo konsistas el tri partoj: kapo, torako kaj abdomeno, kun

KIU ESTAS DEMETRIO?

Demetrio estas sprite celtrafanta karikaturisto, kiu tre bone kunlaboras en la grava ĵurnalo «La Libertad» («La Libereco»).

«**BISKVITETO NE ĜATAS DISKUTI KUN SIA PATRINO**», de Demetrio (el la matena ĵurnalo de Madrido «La Libertad»).


PRI LA BILDO.—Ĉar la spritajo de Demetrio estas muta, oni pridiras laŭ oni konscias kaŭze de la ago, konduto, sintenado



kaj gestoj de Biskviteto. Ĉi tiu, ĉe ĉambro de sia domo, sentas, ke li bezonas urini kaj anstataŭ alkuri al la necesejo, li decidas urini ĉe la ĉambro mem apud la muro, pro kio jen li urinante, kiel li decidis, abunde ĉar li sendube trinkis multe da lakto kaj akvo, kaj li havis la vezikon plena.

palpaj organoj (antenoj) en la kapo, kun ses kruroj metitaj en la ringoj kiuj formas la torakon, kun flugiloj, malsimplaj okuloj kaj kun buŝo kun palpiloj kaj aranĝita por suĉi aŭ maĉi. Al la insektoj apartenas la

PRI LA BILDO.—Sed kiam li jam estis urininta, vidante fluadi la urinaĵon ekpensis pri la konsekvencoj, kuntiriĝante aŭ duonkaŭrante, metante la montrofigorn de la dekstra mano sur la lipojn



kaj malfertante rondege la okulojn, li antaŭvidas sin anuebatota de la patrino, kaj tial li ekpensas planon por sin savi kaj trompi la patrinon, ĉar li estas tre inteligenta, tre ruza.

grilo, abelo, muŝo, vespo, kulo, pulo, pediko, cimo, ŝkarabo (kiun adoris, fervore la egiptoj kaj per kiu ili reprezentis la sunon, kaj simbolicis la renaskiĝon de la vivo), blato, papilio, k. c.

Araĥnojdoj estas bestoj, kiuj ne havas flugilojn, kies kapo kaj torako formas unu solan ringon al kiu estas melita la abdomeno, kiu havas okŝrutojn. Inter ili estas la araneoj, ŝkorpioj (ĉiuj ĉi tiuj estas venenaj, ili sekrecias venenon per glando troviĝanta en la lasta ringo de sia abdomeno (kvazaŭ vosto), kiu finiĝas kiel movebla ungo aŭ hoko).

Krustacoj estas bestoj kies kapo kaj torako preskaŭ ĉiam konsistas el unu sola ringo kaj kies abdomeno konsistas el diversaj ringoj; ili

PRI LA BILDO.—Jen li, paŝante kontente pro la elpensita plano, kun rideto en la buŝo pro memfido preta efektivi la planon.



estas bestoj kiuj havas antenojn en la kapo, dek aŭ dek kvar kruojn kaj ilian korpon defendas tutplene speciala kovrilo. La krabo, kankro kaj paguro aŭ ermito, tiel nomata ĉar ĝi loĝas en konko de mortinta molusko, apartenas al la krustacoj.

La vermoj estas bestetoj longaj, molaj, kies korpo konsistas el multaj ringoj, kaj ili rampas. Inter ili estas la terebelo, serpolo (enfermita en tuboj diversformaj) maraj kaj teraj lumbrikoj, hirudo (uzata por suĉi la sangon de malsanuloj), k. c.

Ankaŭ ekzistas aliaj malsuperaj bestoj kiuj formas grandegan nombron de estaĵoj: zoofitoj, kies aspekto kaj vivmaniero estas kiel tiuj de la plantoj; ekinodermoj, kies korpo estas kovrita de dornoj; entozooj, specialaj vermoj, vivantaj en la intestoj kaj eĉ en la hepato, okuloj, kaj cerbo, kaj tial, la malfacileco koni kiel ili povas alveni en tiujn organojn, devigis opini, ke ili naskiĝis propramove, sed hodiaŭ oni scias ilian devenon, kiu estas ovonaska geni-naska (solitero, lumbriko kaj trikeno—kiun enportis en Eŭropon la amerikaj porkoj—); akefaloj,


PRI LA BILDO.—Biskviteto revenas ĉe la urinaĵo apenaŭ povante subteni per ambaŭ manoj pluvevitilon, kiun li kvazaŭ brakpremas por ĝin porti; kaj li sin vidigas plenĝoja esti trovinta solvon por sin liberigi el la patrinaj batoj, rigardante flanken singardeme kaj aŭskultante atentege ĉu bruiĝas paŝoj de la patrino. Li pensis sendube, ke li vidis iam, kiel pluvevitilo, post pluvo, ellasis akvon, kiam oni malsternis aŭ fermis ĝin.



estas molaj bestoj al kiuj apartenas la meduzoj (multaj el ili sekrecias kaŭstikan substacon); polipoj (kiuj sekrecias ruĝan, rozkoloran kaj blankan kalkan substacon, kiu formas submarajn arbojn, ŝtonegojn, rokojn kaj ankau loĝeblajn insulojn; kies substacon oni nomas koralo, el kiu oni fabrikas ornamaĵojn), la spongo apartenas al la polipoj kaj ĝi vivas alternate al la rokoj; fine, la infuzoroj estas malgrandaj estaĵoj loĝantaj en senmovaj akvoj, puso kaj kelkaj fluidaĵoj, en la vinagro.

PRI LA BILDO.—Apogate sur la muro kun la ekstremo de la urinaĵo, jen la pluvevitilo dum Biskviteto rapide forkuras:

—Kiam la patrino eniros la ĉambron, ŝi, vidante la pluvevitilon, hulpigos ĝin,—tiel Biskviteto diras al si men. La infano ne trompos




la patrinon, kompreneble, ĉar la pluvevitilo estas seka kaj la haladzo de la urinaĵo konvinkos ŝin pri la kulpa filo, sed la ruzaĵo de ĉi tiu certe ridigos la patrinon, kiu tial certe eĉ ne admonos sed smacados la ruzan infaneton.

DEKOKA TEMO.—La amikoj de la homo

La plej grandaj amikoj de la homo, la plej bonaj amikoj de la homo estas: la domaj bestoj, kiuj helpas nian laboron kaj provizas nin per nutraĵoj, vakso, lano, feloj, kaj inter tiuj bestoj oni devas rimarkigi la silkan raŭpon, kiu naskas la gravan silkan industrion, kiu tekas velurojn, atlasojn, puntojn, k. c., kaj ĉiajn silkajn ŝnuretojn; la arboj, kiuj donas al ni ombrojn, purigas la aeron kiun ni spiras, protektas nin,

«**POR ĈIU FINE VENAS TRIUMFA HORO!**»,
de Demetrio (el la matena ĵurnalo de Madrido «La Libertad»).

PRI LA BILDO.—Jen lernejo, en kiu kokino instruas kaj edukas kokidojn kaj anseridon. Kompreneble, la anserido ne estas tiel gracia kiel la kokidoj. Tri el ĉi tiuj, kiuj estas fratoj, konsideras lin




fremda, pro kio ili ĝin mokas, pro kio ili ŝercas pri ĝi, pro kio ili eĉ batas ĝin, vidante ĝin malbela.

—Mi malpermesas al vi, ke vi vin konduitu malĝentile al la anserido, senhonta triunuo!—diris la instruanta kaj edukanta kokino al la tri fratoj, kiuj estis la plej ribelemaj el la disĉiploj.

donas al ni siajn fruktojn, sukeron, panon, siajn sukojn, kaj sian lignon, per kiu ni subapogas la minajn galeriojn por eviti ilian renversigon, el kiu ni fabrikas meblojn, diversajn ilojn, konstruas domojn, barakojn, budojn, ĥabanojn, ŝipojn, k. c., fabrikas ĥarbon kaj paperpaston kaj

PRI LA BILDO.—En la fono, dekstren, la lernejo; de la lernejo, maldekstren, palisaro; post ĉi tiu arbo, iomete kaŝita de la lernejo, kaj longa altano. La kokidoj, elirinte el la lernejo post la anserido, spite de la admono kaj konsiloj de la instruistino, persekutas



la anseridon, branĉbatante ĝin kaj trafante ĝin per ŝtonpafoj. Malfacile la anserido kuras, kuradas, ĉar la membrano, kunigante la fingrojn de ĝiaj piedoj, malebligas la kuradon; ĝi dolorblekadas petante helpon, kaj tio okazis ĝis marĉo...

kies netaŭgajn branĉojn, ŝtupojn, pecojn, ni utiligas por fajrujoj kaj fornoj: la arboj provizas nin per kuraciloj kaj sekrecioj (kiel estas tiu de la pino, el kiu devenas la rezina industrio kun ĝiaj produktaĵoj la terebinto kaj terebintoleo, k. c.), donas al ni korĉon, kotonon (el kiu oni fabrikas, oni teksas multajn tolaĵojn kaj drapojn), kamforon, kininon, kaŭĉukon, gumiguton, araban gumon, tekseblajn fibrojn (el kiuj oni fabrikas ŝnurojn, teksaĵojn, matojn kaj multajn utilajn aĵojn). La akacio, migdalarbo, abio, cinamomo, ĉerizarbo, kaŝtano, mahagono, poplo, tremolo, ulmo, juglando, kverko, figarbo, morusarbo, frago, palmo,


PRI LA BILDO.—La persekuto blindigis la kokidojn, pro kio unu el ili falis en la akvon, ĉar ĝi ne povis haltigi la kuradon, falante en la marĉon post la anserido, kiu sin ĵetis en la akvon por sin



savi. La fratoj de la falinto ekkriis plorante, petante la savon de la dronanto.

daĵtilpalmo, saliko, sambuko, cedro, frakseno, laŭro, avelarbo, oliv-arbo, kokospalmo, ebono, k. c.; multegaj plantoj, kiuj disponigas siajn fruktojn, semojn, foliojn, branĉojn kaj fibrojn kiel nutraĵojn por ni kaj la bestoj, kuracilojn kaj rimedojn por multaj aplikoj (el fibro de la lino oni fabrikas jadenojn kaj delikatajn tolojn; el kanaba fibro saĵojn, teksaĵojn maldelikatajn kaj ŝnurojn; el pajlo de la rizo kaj aliaj gramineaj plantoj delikatajn matojn kaj ĉapelojn, kaj ankaŭ el junĵoj); ĝardenaj plantoj, kiuj per siaj floroj kaj odoroj parfumas la aeron kaj ĝojigas la homan vivon, kaj inter multenombraj oni devas citi la rozon, levĵojon, krizantemon, dianton, tulipon, kamelion, dalion, geranion,

PRI LA BILDO.—La bonkora anserido sin jetas en la marĉon kaj prenante la kokidon per sia beko ĉe ĝiaflugilo, kaj naĝante, ĝin metas sur la bordon apud la fratoj.



violon, heliotropon, hacinton, jasmemon, siringon, lilion, iridon, narcison, lekanton, lotuson, ankaŭ oni devas rememori la filikon kaj muskon.

Sed por utiligi la lignojn, labori, zorgi kaj kulturi la arbojn kaj plantojn, labori en minejoj, fabriki teksaĵojn kaj fari ĉiajn laborojn eĉ studojn, la homo hezonas la helpon de la mineraloj, kiuj donas al li medikamentojn; rimedojn por konstrui (ĥalkon, gipson, cementon, marmoron, graniton, ŝtonon, sablon, argilon por fabriki brikojn kaj tegolojn, k. c.); metalojn (oron, arĝenton, platenon, plumbon, antimonon, kupron, feron, k. c., el kiuj oni fabrikas juvelojn, monerojn, presli-terojn, ŝtalon, pioĉojn, plugilojn, najlojn, pinglojn, ŝraŭbojn, relojn, mullajn maŝinojn por skribi, ĥalkuli, teksu, produkti lumon kaj forton, mezuri, kaj por multe da laboro kaj studo kaj ankaŭ kanonojn, pafilojn, ŝrapnelojn kaj ceterajn, ilojn, por mortigi, bedaŭrinde; nutraĵojn por la herboj, plantoj kaj arboj.

Fine, la naturo ĉiam malavara donas al ni diamanton, kiun la homo ĵacetas por fari la brilanton; ankaŭ donas al ni smeraldon, perlon,

PRI LA BILDO.—Farinte la bonfaron, fiera je sia bonkoreco, pagante tiel la malbonaĵojn, kiujn la tri fratoj faris al ĝi,



la anserido deiras kontenta esti farinta tiel, dum la kokidoj restas ĉe la bordo de la marĉo tute hontiĝantaj. Oni devas kompreni kiel la anserido edifis la kokidojn per sia altmorala ekzemplo.

topazon, turkison, safiron, k. c., kiuj kune kun la plateno, oro, kaj arĝento satigas la homan lukŝon.

Ni ne forgesu la terkarbon el kiu oni ĉerpas multegajn substancojn, kiuj multe helpas la ĥemion kaj taŭgas por kuraci, tinktura, pavimi, gudri, k. c.

A M O T I R A N O

ROMANCO HISPANE VERKITA DE LUDOVIKO DE GÓNGORA

Blinda arkpafant' trafanta,
Di' kaduka, tamen knab',
min vidbandaĝit' vendinta

KIU ESTAS LINAGE?

Linage estas ankaŭ el tre bonaj hispanaj karikaturoj, bona desegnisto kaj tre sprita.

«**RUZAJO DE MAKARIO**», de Linage (el la ĵurnalo «La Libertad», de Madrido).

PRI LA BILDO. — Skulptisto donas al Makario buston. dirante :



—Prenu, Makario, portu la buston de la deputito al la vilaĝo kaj atentu bone ĉar ĝi estas el korko...

kaj infan' en granda l' aĝ',
je l' animo de l' mortinta
cia la Patrino, kvankam
ŝi senmorta, pro l' envio
al mastrino mia, jam.

*Lasu pace min ci, Amoro,
Amotiran'.*

PRI LA BILDO.—Makario portas la buston al la vilaĝo. Li ŝin ŝirmas kontraŭ la malvarma vetero aŭtuna per mantelo, kaj aliras por plenumi la ordonon de la skulptisto. La vilaĝon oni vidas



tra la popoloj jam orumiĝantaj, kies folioj falas teren, la vilaĝon ĉe altanoj.

Malŝparita temp' sufiĉu
al la serv' de cia flag'
malkvieta, kontraŭ mia
vol', rabista kapitan'.
Min pardonu ci ĉi tie,
mi cin tie, kaj jen pag'
paciencaj kvar moneroj,
dek el amoavantaĝ'.

*Lasu pace min ci, Amoro,
Amotiran'.*

PRI LA BILDO.—Kiam Makario iras sur la ŝoseo, portante la buston, lia rigardo trafas popolamason, kiu venas en lin kaj, impresate, ekkrias :



—Ho, ve! Jen la manifestacio, el senlaboruloj, kiun mi devis prezidi! Sed mi senkulpigis mian ĉeeston, dirante ke mi malbonfartas...

Vi, malfeliĉul', amanto
dekoranta en la band',
diru: kia bona gvido
el blindulo estu jam?
Kia konstantec', el birdo?
Kia la esper', el knab'?
Kia el nudul', donaco?
El tirano, ĉu kompat'?

*Lasu pace min ci, Amoro,
Amotiran'.*

PRI LA BILDO.—Makario havis fulman ideon por sin savi,
kaj jen li surmetante la ĉapelon al la busto kaj sin kovrante per la
mantelo, turniĝinte, li ekkrias al si mem :



—Se ili konus min, certe atencus min! Mi celos trompi ilin.

Jarojn dek mi jam malŝparis
bonajn plej el mia l' aĝ',
kulturinte mi la Amon
kontraŭ mia kapital'.
Laŭ la plug' kaj sem', rikolto:
plug' en malserena mar',
semo en sterila sablo;
hont' kaj pen', rikolta fask'.

*Lasu pace min ci, Amoro,
Amotiran'.*

PRI LA BILDO.—La manifestacio pasadas apud la ruza maskita Makario, kaj ĉiuj senlaboruloj salutas demetante ĉapelojn kaj ĉapojn siajn, ekkriante :



—Jen la deputita moŝto!...

Mi starigis altan turon
en la vento kiel baz',
ĝi pli granda, ol Nembroth'a,
kun konfuzo laŭ egal'.
Glor' doloron, la karceron
foro, juĝis mia saĝ',
kaj miel' aloon, eko
finon, la malbonon ŝanc'.

*Lasu pace min ci, Amoro,
Amotiran'.*

«**KAPRICEMA INFANO** aŭ **RUZA AVO**», de
Linage (el la ĵurnalo «La Libertad»).

PRI LA BILDO.—Avo. iras akompanate de nepo kaprice-
ma, malbonhumora kaj plorema. La avo estas lama kaj malfacile



marŝadas per siaj lignaj kruroj kun helpo de bastono. Ĉar la infano
vidis balancilon, li, kriadante kaj ploregante, petas :

—Berrr... aaah... oooo!... Mi volas balancilon, mi volas ba-
lancilon!...

ANTAŬEN!

(HIMNO)

Atentu la vokon!
Nu; nia falango
de loko en lokon,

• **PRI LA BILDO.**—La avo trenas, penege irante, la nepon, kaj dirante :

—Silentu, karulĉjo, silentu; mi aĉetus al vi karamelojn se vi ne ploregus plu.



Sed la infano daŭrigas sian ploregon :

—Aaah... oooo... berrr! Mi volas balancilon! Mi volas balancilon!...

ĉe l' pinto de stango
flirtanta la Verda Standardo,
senĉese jam kuru ;
labori obstine, kun ardo
fervore, do, ĵuru !

*Antaŭen kuraĝe,
kun fid' en la koro ;*

PRI LA BILDO.—Jen la avo kun la nepo, sur la herbejo de la promenejo, dirante :



—Ho, ve! Teda infano!... Mi ne povas legi la jurnalon!

*antaŭen kuraĝe
al nia laboro
kun fid' en la koro!*

La lingvon diskonu
tra ĉie senĉese ;
ni lingvon entronu
rapide, sukcese,
ĉar lingv' Esperanto ja havas
fratigan la celon ;
el lukto Homaron ĝi savas,

PRI LA BILDO.—La avo havis bonan planon kaj ekfaras ĝin dirante al si mem :



—Mi komplezos ĉi tiun kapricemulon, ĉar ĉiam mi estis **genie** inspirata !

forigas kruelon !
Antaŭen kuraĝe,
kun fid en la koro ;
antaŭen kuraĝe
al nia laboro
kun fid' en la koro !

La HISPANA ESPERANTO-ASOCIO akceptis la **PREGON** SUB LA VERDA STANDARDO de la Majtro, kiel sian **HIMNON**, kun muziko de Jozefo Seva, kiu devigis aranĝi la finojn de la strofoj laŭ sekve oni vidos.

PREGO SUB LA VERDA STANDARDO

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,

PRI LA BILDO.—Jen funkcianta la plano de la avo: li per ŝnuro de la infano kaj siaj lignaj kruroj starigis balancilon. La balancilo estas al la infano balanciĝanta granda ĝojo, kiel elpravas



lia ridado, dum la avo kuŝas kun la kruroj alten, apogante sian kapon sur ŝtipon kaj dirante:

—Jen, jen! Ĉiuj kontentaj! Mi legos...

Al Vi, granda fonto de l, amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta,
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
Sed ĉiu egale en koro vin sentas,
Al VI, kiu kreas, al VI, al VI, kiu reĝas
Al VI

Hodiaŭ ni preĝas, hodiaŭ ni preĝas,
Ni preĝas, ni preĝas, ni preĝas.
Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
Kun dogmoj de blinda fervoro;
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro,

Himno del Grupo "Antaüen." Música de Francisco Calés
Allegro maestoso Versajo de Julio Mangada Rosenörn

Coro

A-ten-tu la vo-koñ! Na

Piano

ni-a fa-lan-go de lo-ko en lo konçel'jin-to de stan-go flir-

tan-to la ver-da stan-dar-do sen-çe se jam ku-ru; La

intensa

bo-ri - ob-sti-ne, kun ar - do fer-vo-re, do ĵu - ru — *An.*

dimi

cresc:

taŭ-en ku-raĝe kun fid'en la ko-ro, an-taŭ-en ku-ra-ĝe al

cresc:

ni-a la-bo-ro; kun fid'en la ko-ro!

diminuendo

PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO

Poemo de L. L. Zamenhof - Muziko de Jozefo Seva

Maestoso

Al Vi ho po-ten-ca sen hor- pa-mis-te-ro for-te-go la

The first system of the musical score consists of a vocal line on a treble clef staff and a piano accompaniment on a grand staff (treble and bass clefs). The tempo is marked 'Maestoso'. The lyrics are 'Al Vi ho po-ten-ca sen hor- pa-mis-te-ro for-te-go la'.

mon-don re-gan-ta Al Vi granda fon-to de l'a-mo kaj

The second system continues the musical score. The lyrics are 'mon-don re-gan-ta Al Vi granda fon-to de l'a-mo kaj'.

ve-ro kaj fon-to de vi-vo kons-tan-ta Al Vi ki-un ĉi-uj mal-

The third system continues the musical score. The lyrics are 've-ro kaj fon-to de vi-vo kons-tan-ta Al Vi ki-un ĉi-uj mal-'.

sa-me pre-zen-tas sed ĉi-uj e-ga-le en ho-ro vin-sen-tas Al

The fourth system concludes the musical score. The lyrics are 'sa-me pre-zen-tas sed ĉi-uj e-ga-le en ho-ro vin-sen-tas Al'. Performance markings include 'Rall.' and 'Tpo.' above the vocal line, and 'Rall.' and 'Tpo.' below the piano accompaniment.

Vi ki-u hre-as al Vi — Al Vi ki-u re-ĝas al Vi ho-di-aŭ ni
pre-ĝas ho-di-aŭ ni pre-ĝas ni pre-ĝas ni pre-ĝas ni pre-ĝas

cres. ... cen do ff

Kun ĝi la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj, ni nun, de l' tuta homaro,
Ni nun,
Ĉe via altaro, ĉe via altaro,
altaro, altaro, altaro.
Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
Sed ĝi sin dividis batala;
Popolo popolon atakas kruele,
Frat' fraton atakas ŝakale,
Ho, kiu ajn estas vi, forto mistera,
Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
Redonu la pacon, al ni, al la infanaro,
jam nun,
De l' granda homaro, de l' granda homaro,
Homaro, homaro, homaro.
Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron;
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ, do, jam, atakoj sovaĝaj,
Do, jam,
Nin tenu kuraĝaj, nin tenu kuraĝaj,

Kuraĝaj, kuraĝaj, kuraĝaj.
La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon,
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, de nun la amo kaj vero,
De nun
Ekregos sur tero, ekregos sur tero,
Sur tero, sur tero, sur tero.

F I N O

Jen, sekve, la himno de la hispanaj rotarioj, belega himno de la poezia, muzika kaj ideala, vidpunktoj, kiu povas fariĝi internacia nia himno anstataŭante «*Hispanrotarioj'n*» kaj «*Tutmondrotarioj'n*» per «*Tutmondesperantoj*»; ankaŭ povas fariĝi nacia ĉe kiu ajn lando per «*Hispanesperantoj*», «*Ho, francesperantoj*», «*Ho, britesperantoj*», «*Germanesperantoj*», k. c.

Hispane verkis Luis Fernández Ardavín

Hispanrotarioj! La bono al Mondo;
La normo labori; la leĝo honor';
La Paca Kolomb' kaj Amsago laŭ ondo
Bonporta, jam flugu al ĉies la kor'.
La helpon al frat'; por milit' abomenon;
Nur solajn deziron kaj kredon sen dub'!
Tutmondrotarioj, ni zonu la ĉenon,
Ĉirkaŭen la Tero, de nia la Klub'!
Hispanrotarioj! La nova agado,
Ludante trumpetojn, vin vokas al lukt'.
La lanco rompita, rustiĝis la spado!...
De niaj armiloj plej bona la frukt'!

RIMARKO.—La profesoro profitos la bildojn por fari ĉiajn priklarigantajn frazojn pri ili kaj iliaj partoj.

"Rotaria Himno de Hispanujo"

Versaĵo hispana de
Luis Fernández
Ardavin

Traduki's
Julio Mangada

Komponis
Francisco
Rosenjörn
Alonso

Majesta marŝo

Aŝoro

His-pan-ro-ta-ri oj!

La bo no al mon do; la nor ma la-bo-ri la le-ĝo ho

nor La Pa-ka-lem-b' kaj Amsa go la ŝ on-do Bon por ta jam

flu-gu al ĉi-es la kor' *pp* La hei-non al frat, por

pp

milit'abo-me-non nur *solajn* de-zi-ron kaj kredon *p* *mf* Tiel roto
sen dub! mond


mf

ri - oj *f* ni zonu la ĉe - non *f* ĉir' en la te-ro deni-a la

f

Solo

klub! Hispanrolarioj! La nova agado de dan-
lu trum




petojn vin vokas al lukt? Lalanco ni ta, rustiĝis la



spado. De ni ĝarmitoj plej bona la frukt' *ten* *Ĥoro* Hispan-
rotarioj la

rall.





I N D E K S O

	<i>Pagoj</i>
Antaŭditoj	1 - 2
Klarigoj pri la maniero disvolvi la instruon.....	3 al 16
La Saluto.....	17 - 18
Pri la tempo.....	19
La horloĝo.....	24 - 26
Pri fumado.....	27 - 29 - 30 - 31 - 32 - 33
Korespondado	33
En kafejo	34 al 37
Cecsti teatran prezentadon.....	38 al 40
Ekskurso al la marbordo.....	40 al 43
Vespermango en la restoracia vagono.....	44 al 46
Alveno al marborda urbo.....	46 - 47 - 49 - 50
Li vizitas urbon.....	50 al 53
Li vizitas ŝipon en la haveno.....	53 al 57
Marekskurso	57 al 61
La familio	61 - 62
La homa korpo.....	63 al 66
Nutraĵoj	67 al 74
Bestoj	75 al 86
La amikoj de la homo.....	87 al 92
Amotirano (Romanco tradukita) de Luis de Góngora.....	92 al 97
Himno «Antaŭen».....	99 al 102
Preĝo sub la verda standardo (Himno de H. E. A.).....	103 al 104
Hispana rotaria himno.....	105 al 111

RAKONTOJ KUN KARIKATUROJ

«Homo singardema», Arrúe.....	3 al 7
«Eĉ la plej lerta estas trompata», Arrúe.....	8 al 12
«Migrintoj al Ameriko revenas», Arrúe.....	13 al 16
«Ĉu ne estu alkoholema?», Arrúe.....	20 al 23
«La rekta linio», Arrúe.....	23 al 27
«Estas necese doni ĉion faritan al li», Arrúe.....	28 al 32
«Por paŝtrafi de longe», Arrúe.....	34 al 38
«Kolerio estas malbona konsilanto», Arrúe.....	39 al 42
«La fiskaptemulo kaj la rigardanto», Arrúe.....	43 al 47
«Konscienciproĉo», Bagaría.....	48 al 51
«Alia konscienciproĉo», Bagaría.....	52 al 55
«Internaciaj fantaziemuloj», Bagaría.....	56 al 59
«Lasta decido», Bagaría.....	60 al 63
«Bonega urbestro», Sancha.....	64 al 68
«Maŭroj kaj kristanoj», Sancha.....	69 al 73
«Malsana cigano», Martínez de León.....	74 al 77
«La bopatrino», Martínez de León.....	78 al 82
«Biskviteto ne ŝatas diskuti kun sia patrino», Demetrio.....	83 al 87
«Por ĉiu venas triumfa horo», Demetrio.....	88 al 92
«Ruzaĵo de Makario», Linage.....	93 al 97
«Kapricema infano aŭ ruza avo», Linage.....	98 al 102

bonekzemplaj noveloj de Cervantes, tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn, 19 × 14 cm., 70 paĝa, luksa papero. Prezo: 0,75 el sv. fr.

¿QUE ES EL ESPERANTO?, verkita kaj aranĝita de Julio Mangada Rosenörn, entenante hispanlingve opiniaron pri esperanto de tutmond-jamaj eminentuloj, koncizan gramatikon, nur esperantan ekzercaron el tiu de la Majstro kaj sufiĉe kompletan esperant-hispanan vortaron; tial la kajero 14 × 10 cm. kaj 32 paĝa estas vere kompleta lernolibro por hispanlingvanoj. Prezo: 0,15 el sv. fr.

SANTANDER, de Julio Mangada Rosenörn, eldonita de H. E. A. dank' al subvencio de la Nacia Patronaro por Turismo, rimarkinda gvidlibro pri la urbo kaj la teritorio, ĥun pli ol cent belegaj ilustritaĵoj eĉ du muzikaĵoj pri du popolokantoj, ĥun interesa priskribo pri moroj, k. t. p., 19 1/2 × 13 1/2 cm., 128 paĝa, luksa papero. Prezo: 2 sv. fr.

La PREZOJ notitaj enĥalkulas la nerekomenditan poŝtelspezon, kaj por esti responda pri la alsendo, oni devas aldoni 0,10 el sv. fr. po ekzemplero al diritaj prezoj.

— A T E N T U ! —

Nepra devo de ĉiu vera esperantisto estas aparteni al NACIA ASOCIO, pro ĥio fakte oni fariĝas SIMPLA MEMBRO de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (U. E. A.), ricevante la unikan universalan membrokarton kaj servoĥuponon por la universalaj interrilatoj. NENIU DEVAS RESTI IZOLA ESPERANTISTO, ĈIU MEMBRO DE HISPANA ESPERANTO-ASOCIO (H. E. A.) RICEVAS JARE DE LA ASOCIO PLI, OL LI PAGAS.

Sciŭ, ĥe U. E. A. havas diversajn membrecojn, pro ĥio, ĉiu samideano, ĥalkulinte siajn monrimedojn devas nepre fariĝi ĥategoriano de U. E. A. laŭ sia monebleco. Jen la aliaj ĥategorioj:

MEMBRO AKTIVA; li ricevas membrokarton, servoĥuponaron kaj Jarlibron.

MEMBRO AKTIVA ABONANTO; li ricevas ĥiel la antaŭa ĥategorio kaj plie la revuon «Esperanto» ĉiumonate.

MEMBRO SUBTENANTO; li ricevas ĉion diritan kaj plie librojn, ĥiujn li povas elekti el listo.

ĈIU SIN TURNU AL SIA ASOCIO! ARIĜU EN GRANDA ENLANDA ASOCIO! SUBTENU LA TUTMONDAN ESPERANTO-ORGANIZAJON!

PREZO de ĉi tiu verko:

<i>Por membroj de Hispana Esperanto-Asocio....</i>	<i>2 pt.</i>
<i>Por ceteraj hispanaj samideanoj, ĉiel por hispanamerikanoj</i>	<i>4 pt.</i>
<i>Por ĉiuj ceteraj samideanoj.....</i>	<i>3 sv. fr.</i>

Naciaj Asocioj, mendante rekte po grande, havos grandan rabaton eĉ duonon el la du lastaj prezoj. Pri la libroj anoncitataj de ĉi tiu, ankaŭ H. E. A. faros grandan rabaton al Naciaj Asocioj; ĉi tiuj petu informojn.